

januaro 1973

66-a jaro

n-ro 805 (1)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

Floroj
trans
limoj



Vi trovos

en nia jarsojla numero buntan mikspoton da artikoloj kaj informoj, kia espereble kontentigos almenaŭ iom ĉiujn gustojn. Dum 1972 atingis nin plurfoje voĉoj de legantoj, kiuj sopiras al pli vasta kaj varia enhavo de la revuo, precipe kun temoj ekstermovadaj kiel scienco, kulturo, aktualaĵoj kaj similaj. Niaflanke, ni tre volonte aldonus tiajn temojn, se ni disponus pli da paĝoj kaj pli da kunlaborantoj sur diversaj kampoj. La redakcio ĉiam bonvenigas sinanoncojn de kunlaborantoj kun bona lingvoscio kaj aparta kompetenteco pri difinitaj temoj. Kaj rilate la paĝonombron de la revuo — tio dependas de la kunlaboro de ĉiu unuopa membro, ĉar nur per via helpo ni povas kreskigi la membraron kaj tiel ebligi la kreskon kaj pliboniĝon ankaŭ de la revuo.

La kovrilo

Narcisoj kaj amika rideto salutas ĉiujn niajn legantojn okaze de la Nova Jaro 1973. Pli universala gesto saluta apenaŭ ekzistas, ol la floroj, kaj ni, kiel universalistoj, kun plezuro omaĝas per originala artikoleto la mondan flor-organizaĵon Interflora, okaze de ĝia 50-jara jubileo. Eble ankaŭ vi decidus utiligi la servojn de tiu efike funkcia internacia reto okaze de la Semajno de Internacia Amikeco aŭ por iu alia festo alilanda. Se jes, tiam certe interesos vin ekscii (sur la paĝo 5), kiamaniere ĝi funkcias. Notu jam nun en via agendo la datojn de la Semajno de Internacia Amikeco (ĉiam la lasta kompleta semajno en februaro): la 19a ĝis la 25a de februaro 1973.

Enhavo

- 1 Survoje al integriĝo (Lapenna)
- 2 Parlamenta subteno
- 3 Unua edziĝo Esperanta en Kanarioj
- 4 Sukcesa agado en urba turismo (Kavenius)
- 5 Interflora: unika organizaĵo tutmonda (Breddels)
- 6 Recenzoj
- 6 Simbolo & vorto
- 7 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 8 La adverbo (Gregor)
- 8 Pri Sindhujo (letero)
- 9 Lerneja Bulteno N-ro 25:
Instruistoj lernas Esperanton
- 11 Nekrologoj: Chavet, Losada, Ungár, Miuccio
- 12 Beograd jam konkretiĝas
(58a Universala Kongreso, Beograd, Jugoslavio, 1973)
- 12 Informoj pri la 29a IJK de TEJO
- 13 TEJO-paĝo
- 14 Loke - Fake - Persone
- 15 "Frosta neĝo" (Plukša/Kubulnieks)
- 16 Komenco bona — ĉio bona
- 17 Esperanto en radio
- 18 Disaŭdigoj sur la mallongaj ondoj
- 19 Oficiala informilo N-ro 463
- 19 Magnetofona Servo de UEA
- 20 Anoncetoj

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktorino: A. Woessink-Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.



Survoje al integriĝo

Foto: NASA

Unu el la antaŭkondiĉoj por scienca ekzamenado kaj studado de fenomenoj en la socio estas rigardi ilin ne kiel statikajn statojn, sed kiel dinamikajn evolu-procezojn. Tio signifas ne limigi sin nur al tio, kio estas, sed analizadi la nuntempon en la lumo de la pasinteco por povi malkovri la evolutendencojn, kiuj kun maksimuma probablo kaŭzos difinitajn novajn situaciojn en la estonteco. Ne estu miskompreno. Ne temas ĉi tie pri iaj ĉarlatanaj profetaĵoj, tiel oftaj en la pasinteco, nek pri ia fantazia futurologio dependa de personaj preferoj, sed pri scienc-fundamentitaj antaŭvidoj, ebligantaj ĉu konscie rapidigi la evolu-procezon, ĉu ĝustatempe preventi nedezirindajn aŭ eĉ katastrofajn sekvojn, ĉu prepari la homon rapide adaptiĝi al novaj kondiĉoj, kiuj atendas lin en nia akcelita mondo.

La impona teknologia progreso en la lastaj jardekoj — progreso abunde transpasanta ĉion atingitan dum multaj antaŭaj jarcentoj prenitaj kune — kreis potencon reton de ĉiaspecaj teknikaj rimedoj de komunikado en mondaj kadroj; ebligis intensigon de internacia komerco kaj migradon de personoj en dimensioj neniam antaŭe spertitaj; faciligis la kreon de vastaj komunaj merkatoj. Ĉio-ĉi ekonomie interligis kaj ĉiam pli senteble interdependigas la diversajn mondopartojn kaj regionojn. El materia vidpunkto la mondo, antaŭ niaj propraj okuloj, rapide formiĝas kiel unueca tuto, kun kreskanta nombro da komunaj problemoj, kiujn ĝi povas solvi nur per komunaj fortoj.

Aliflanke troviĝas la fenomenoj de la politika kaj socia superstrukturo. Kvankam ankaŭ en tiu sfero estas faritaj progresoj, tamen ili konsiderinde postrestas la faktajn bezonojn.

La ŝtato ja ĉesis esti la sola subjekto de internacia juro, sed ĝi plu restas la ĉefa. Pro la ampleksiĝo de demandoj, kiuj altrudas internacian kunlaboron, formiĝis tuta aro da interŝtataj organizaĵoj kaj specialigitaj institucioj, kelkaj eĉ kun supernaciaj povoj. Antaŭ 1860 ekzistis nur unu interŝtata organizaĵo; en 1969 estis ĉ. 200; hodiaŭ funkcias 530 kune kun la Eŭropaj instancoj. Kvankam ilia rolo ne estas neglektebla, tamen iliaj ekzisto, jura personeco kaj kompetentecoj dependas ekskluzive de la volo de la ŝtatoj.

Kresko de organizaĵoj

Eĉ pli karakteriza kaj simptoma por la evolutendencoj en internaciaj rilatoj estas la nombra kresko kaj varieco de celoj de neregistaraj organizaĵoj, nome de sendependaj internaciaj asocioj, kreitaj laŭ privata iniciato kaj subtenataj de la propra membraro. Antaŭ 1860 estis 7 tiaj asocioj; en 1960 la nombro altiĝis al 1255, nuntempe ekzistas kaj aktivas pli ol 2600. Iliaj multnombraj celoj klare spegulas la vastan gamon de ekonomiaj, kulturaj, sciencaj, edukaj, religiaj, sportaj kaj multaj aliaj profesiaj kaj neprofesiaj intereso, kiuj ĉiam pli kunligas la ordinarnajn homojn

Dum aparta ceremonio okazinta la 3-an de junio, 1972, la Universitato de Fort Lauderdale en Florido, Usono, atribuis al prof. d-ro I. Lapenna la titolon de doktoro *honoris causa* pri internaciaj rilatoj pro liaj sciencaj esploroj kaj verkoj en tiu sfero, inkluzive la studojn koncerne la lingvan demandon en la moderna mondo. La kutiman dankan alparolon al la solena kunveno legis d-ro John L. Lewine, kiu anstataŭis la honorigiton. En sia parolado prof. Lapenna prezentis la evoluon de internaciaj rilatoj kiel akademia studobjekto. En la lasta parto, kiun ni publikigas ĉi tie, prof. Lapenna koncize pritraktis la rolon de la Internacia Lingvo en la procezo de morala-intelekta integriĝo.

Parlamentara subteno

Enketo farita de anoj de Brita Esperantista Asocio montras, ke, el 100 parlamentanoj demanditaj, 45 favoras Esperanton kiel la Internacian Lingvon. Dek kvar aŭ kontraŭas aŭ opinias, ke la angla lingvo devas esti la internacia lingvo; dek tri ne kontraŭas, kaj dudek ok ne indikis preferon.

Inter tiuj, kiuj favoras, estas s-ro George Thomson, antaŭe ministro kun aparta respondeco pri la Komuna Merkato. Ok el la parlamentanoj jam studis Esperanton, inkluzive de s-ro Harold Wilson, la antaŭa ĉef-ministro.

Granda nombro da parlamentanoj bedaŭras, ke Esperanto estis neglektata kaj en la lernejoj kaj en radio kaj televido. Tamen, la decido starigi kursojn estas la respondeco de la koncernaj sendependaj instancoj.

Unu surpriza rezulto estis, ke s-ro Geoffrey Rippon, la ministro kun respondeco por la Komuna Merkato en la nuna registaro, respondis, ke oni spertis nenium bezonon por instigi la uzadon de Esperanto kiel internacia lingvo en la funkciado de la komunumo. Li klarigis: "La kvar ĉefaj lingvoj de la nunaj ŝtatoj estas la oficialaj lingvoj de la komunumo". Aliflanke la Komitato pri Kulturaj kaj Sciencaj Problemoj de la Konsilantaro de Eŭropo mem asertis: "Sed ni scias el nia propra sperto, ke, kiam homoj, kiuj uzas diversajn lingvojn, kunvenas pro iu komuna intereso, ili ofte renkontas gravan barilon rilate al la lingvo".



D-ro Régulo gratulas la novajn geedzojn. Dekstre kunatestanto. D-ro Régulo estas, krom katedro

Survoje al integriĝo

(daŭrigo)

regione aŭ monde trans la limoj de iliaj ŝtatoj aŭ nacioj. Tamen, la fakta signifo kaj pozitiva rolo de neregistaraj organizaĵoj ankoraŭ ne estas adekvate rekonitaj, kaj multaj demandoj — ekzemple tiuj de jura personeco aŭ efika kunlaborado kun interŝtataj institucioj — postulas urĝan solvon.

La nacioj en etnika senco de la vorto, precipe se ili ankoraŭ ne sukcesis formi sian nacian ŝtaton, kaj la naciaj minoritatoj en plurnaciaj regnoj, ankaŭ aŭdigas sian voĉon ĉiam pli laŭte kaj prezentiĝas kiel gravaj faktoroj en la nuntempa internacia realaĵo. La malgrandaj, multaj mezgrandaj, en kelkaj kazoj eĉ grandaj nacioj postulas rekonon de sia nacia identeco por rezisti pli efike la minacojn de ekonomia kaj politika sklaviĝo aŭ eĉ de kultura genocido. Fine, la individuo sukcesis atingi kelkajn rajtojn kaj fari paŝeton antaŭen sur la vojo de sia formiĝo kiel membro de la homaro. Pli frue li estis rekonita kiel

subjekto de internacia juro nur se li estis pirato aŭ milita krimulo. Ne tre enviinda subjekto. Nun li komencas aperi kiel persono, al kiu la Universala Deklaracio rekonis difinitajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn sen distingo laŭ raso, nacieco, religio, sekso aŭ lingvo. La Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj eĉ koncedis al li la karakteron de jura subjekto, kiu en kelkaj kazoj povas rekte aperi kaj protekti siajn interesojn antaŭ internacia instanco, ne nur sen interveno de la ŝtato, sed eĉ kontraŭ sia propra registaro. Tiuj progresoj, kvankam rimarkindaj, estas tamen tro malgrandaj kaj modestaj kompare kun la rolo, kiun la individuo jam hodiaŭ rekte plenumas en la mondo kiel negocisto, scienculo, laboristo, studento, aŭ simpla turisto kaj vojaĝanto, ankoraŭ malpli kun la pozicio, kiun li okupos morgaŭ.

Blokoj kaj kontraŭblokoj

Mallonge, dum la spektaklaj teknologiaj progresoj ebligas al la homaro sperti en la nuntempo la 21an jarcenton, la kadukiĝintaj konceptoj pri suvereneco, potencpolitiko, blokoj kaj kontraŭblokoj, kun ĉiuj aliaj sekvoj de tiuj konceptoj, forte katenas ĝin al la 19a jarcento. Tio prezentiĝas kiel la ĉefa antagonismo de nia transira epoko, kiu iusence resumas ĉiujn aliajn, tre multnombrajn kontraŭaĵojn kaj kontraŭdirojn.



s-ro Antonio Ferrer Hervás, frato de la fianĉino, kiu rolis kiel profesoro de Esperanto, la eldonisto de STAFETO-libroj.

Unua edziĝo Esperanta en Kanarioj

La 8an de novembro 1972 okazis en La Laguna (Tenerifo) la geedziĝo de f-ino Ana María Ferrer Hervás, kanarianino, diplomitino pri Esperanto de la Universitato de La Laguna, kun s-ro Janez Zadavec, sloveno, inĝeniero pri elektrotekniko, kiu vojaĝis al Tenerifo por la efektivigo de la ceremonio. La gefianĉoj interkonatiĝis en Madrido, dum la Universala Kongreso okazinta en tiu ĉefurbo.

Ĉar la lokaj aŭtoritatoj ne sciis la lingvon de la fianĉo kaj la fianĉo ne sciis la hispanan, funkciis kiel oficiala interpretisto, same dum la preparado de la dokumentaro, kiel dum la geedziĝa ceremonio, d-ro Juan Régulo Pérez, prof. de Esperanto en la Universitato de La Laguna. Multaj geamikoj kaj Esperanto-parolantoj ĉeestis la ceremonion, pri kiu la gazetaro vaste informis kun aperigo de pluraj bildoj, ĉar ja por la unua fojo okazis en Kanarioj geedziĝo, kie Esperanto rolis kiel ĉefa lingvo.

La novaj geedzoj fiksis sian loĝejon en Maribor (Jugoslavio). Longan feliĉan vivon al la juna internacia paro!

Por ĉiu profunda studanto de internaciaj rilatoj en tiu ĉi vasta senco de la vorto estas klare, ke la homaro iom post iom, tre malfacile, rompas la ĉenojn de la pasinteco kaj klopodas trovi novajn formojn de internacia kunvivado, adekvatajn al la postulatoj de la enormaj materiaj fortoj, pri kiuj ĝi disponas kaj kiuj grandiĝas ne plu de jaro al jaro, sed de tago al tago.

La plej obstina obstaklo

Sur la vojo al integriĝo, la morala-intelekta flanko estas same grava, kiel la ekonomia-materia kaj la socia-politika. Fakte, la morala-intelekta integriĝo prezentiĝas kiel peranto inter la du: formiĝo de sociaj-politikaj institucioj, konformaj al la postulatoj de la nuntempaj materiaj fortoj, ne estas imagebla sen morala-intelekta integriĝo. Obstakloj troviĝas ĉie, sed sur la vojo al morala-intelekta integriĝo la plej obstina estas la lingvodiverseco. Ni fieras, ke homaj estuloj jam povas promeni sur la surfaco de la luno, sed ni emas forgesi, ke tiuj samaj estuloj plu restas surdaj kaj mutaj ekster siaj lingvaj komunaj. Necesas konsciiĝi pri tiu gravega problemo. Necesas kompreni, ke ĉiuj klopodoj al pliaj internacia kaj interhoma kompreniĝo devas resti vanaj, aŭ doni nur minimumajn rezultojn, se la vastaj amasoj de

ordinaraj homoj, la novaj civitanoj de la mondo, ne havas la eblecon kompreni unu la alian, eĉ pri la plej simplaj aferoj, ekster la kadroj de siaj naciaj lingvoj. Ĝuste tio estas plia studtemo en la framo de internaciaj rilatoj, al kiu kompetentaj personoj, kunlaborantoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, dediĉas apartan atenton.

La rezultoj de niaj ĝisnunaj esploroj kaj studoj kondukis nin al la konkludo, ke la adopto de la Internacia Lingvo (Esperanto), kiel simpla kaj neŭtrale homa instrumento de komunikado en internaciaj rilatoj, jam elprovita en multjara praktiko, povas sukcese plenumi tiun taskon kaj tial prezentiĝas kiel la sola racia kaj radikala solvo de la lingva problemo.

La moderna homo apartenas al tri ĉefaj sociaj kungrupiĝoj, entenataj unu en la alia: la regiono, kiu lin naskis, la nacio kaj la homaro. Por la du unuaj ĉefaj aspektoj de sia socia naturo li havas du lingvojn: la regionan dialekton aŭ apartan parolformon kaj sian nacian lingvon. Li plu flegu kaj konservu ilin kiel tre valorajn rimedojn de komunikado en la kadroj de sia regiono kaj de sia nacio. Sed la neŭtrala Internacia Lingvo plenumu la funkcion de lingva komunikado en la tria aspekto, aparteno al la mondo, pri kiu li fariĝas ĉiam pli kaj pli konscia.

Sukcesa agado en urba turismo

N. Kavenius



Kunlaboro kun oficialaj instancoj malfermas multajn pordojn por efika informado pri Esperanto, kiel tion pruvas la ekzemplo de Turku. Sur la foto: policoficiro Pekka Läntinen elektas la premiotajn kartojn kun la loka aktivulo Harri Melasniemi. Maldekstre: la sekretariino de la Esperanto-klubo de Turku, f-ino Sirkka Salmivaara, kaj magistrino Margaretha Jokinen, estrino de la muzeo de la skulptisto Wäinö Aaltonen.

Unu el la plej gravaj taskoj de nia movado estas trovi kaj uzi novajn rimedojn por nia informado ekster niaj propraj vicoj. En Turku, Finnlando, oni jam dufoje trovis tiajn eblojn, eĉ por kunagado kun urbaj aŭtoritatuloj. La rezultoj estis tiel bonaj, ke mi volas rakonti pri tio kiel ekzemplo al la esperantistaro.

La urba registaro de Turku aranĝas ĉiuaŭtune "Turku-tagon". Celo estas dum la tago naskigi inter la loĝantaro plian intereson al siaj propraurbaj socia, kultura kaj trafika servoj. Por tio elektita festkomitato aranĝas diversajn amaskunvenojn, senpagajn festojn ktp. Per grandaj anoncoj en lokaj gazetoj la komitato informas la loĝantaron pri la okazaĵoj.

3 500 respondoj

Antaŭ unu jaro, en 1971, la loka Esperanto-societo proponis al la komitato, ke ĝi anoncu en la revuo *Esperanto* per la Internacia Lingvo pri la "Turku-tago" kaj proponu, ke ĉiuj eksterlandaj interesitoj sendu salutkarton al la festkomitato. Ĉiuj ĝustatempe alvenintaj kartoj partoprenos lotumon. Dek gajnintoj ricevos kiel donacon belan Turku-stilan pupon.

La rezulto estis bonega. Al la festkomitato venis 3 500 poŝtkartoj el diversaj kontinentoj. La gajnintoj ricevis sian premion.

Aŭtune en 1972 sama afero okazis. Nun alvenis mil kartoj, iuj eĉ el Suda Ameriko. Per la venintaj salut-

kartoj oni poste aranĝis en montrofenestroj ekspozicion. Ĝi montris, kiel multaj landoj salutis nian urbon per Esperanto.

Tiun ekspozicion oni komencis en fenestro de Urba Turista Oficejo. Poste oni montris ĝin en nia ĉefbiblioteko, kie samtempe okazis ekspozicio de la Esperanta literaturo. Poŝtkarta ekspozicio vizitis ankaŭ lernejojn.

La signifo de la okazinta "bildkartludo" estas jena:

1. La urba konsilantaro (registaro) donis monon por la Esperanto-aranĝo.
2. La oficiala urba festkomitato kaj Esperanto-societo kunlaboris.
3. Larĝa kaj grandskala anoncado pri la festotago en la gazetaro notis ankaŭ la nomon de la Esperanto-societo.
4. Tabuloj de la kolektita bildkartaro esperantlingva estas uzeblaj por sekvantaj diversaj ekspozicioj en lernejoj kaj organizaĵoj.
5. La sukcesinta kunlaboro kun oficiala urba aŭtoritato malfermas novajn eblojn en venonta agado inter la du instancoj.
6. La prezidanto de la oficiala festkomitato donis intervjuon al *Informilo*, kluba organeto de la loka Esperanto-societo. En tiu li diris, ke sen helpo de la Internacia Lingvo la komitato ne estus ricevinta tiel vastan atenton el ĉiuj partoj de la mondo. Li deziris, ke la kontakto daŭru.

INTERFLORA



Unika organizaĵo tutmonda

Ĉi tiun artikolon pri monda komerca organizaĵo kontribuis okaze de ĝia 50-jara jubileo (kaj ĝustatempe por la Semajno de Internacia Amikeco 1973) s-ro A. Breddels (Hago).

Preskaŭ ĉie en la mondo oni kutimas esprimi siajn sentojn per simpla, simpatia maniero. Okaze de naskiĝo, geedziĝo, morto aŭ jubileo, ĉiam floroj reprezentas la sentojn de la donacinto. Ofte oni mem ne povas transdoni la florsaluton kaj tiukaze aplikas helpon de floristo, precipe se la parenco aŭ konato loĝas en fora lando. Jam antaŭ 50 jaroj floristoj en la tuta mondo fondis organizaĵon por servi al la publiko. Nuntempe en 129 landoj 37 000 floristoj kunlaboradas.

Se iu deziras liverigi florsaluton translimen, oni povas pere de Interflora-floristo realigi tion. Estas eble eĉ elekti flor-aranĝon aŭ bukedon tian, kiaj tiuj estas farataj en la koncerna lando. La Interflora-floristo povas montri al kliento internacian katalogon. En ĝi estas kolore presitaj fotoj de florumanĝoj; ankaŭ la prezoj estas indikitaj.

La procedo ĉe la floristo estas jena: li transdonas la mendon skribe, telegrafe aŭ telefone al kolego, kies nomon kaj adreson li povas trovi en la Interflora-gvidlibro pli-ol-1000-paĝa. Kelkaj floristoj disponas pri teletajpilo.

Lia eksterlanda kolego, ricevinte la mendon, simple plenumas ĝin.

La kliento pagas al la floristo, kaj tiu siavice sendas ĉiumonate la faktureojn de la mendoj al la Centra Oficejo en sia lando. La konto-reguligo inter la diverslandaj floristoj okazas per "fleurin", kiu estas nestampita (fiktiva) monunuo. Ĝi funkcias kiel iam la "speso" proponita de esperantistoj kaj kiel la "stelo" de Universala Ligo.

En Eŭropo la organizaĵo nomiĝas "Fleurop-Interflora", kaj la ĉefkontoro troviĝas en Zŭrich. En la eŭropa kontinento kunlaboras 20 landoj. La tutmonda ĉefkontoro estas en Usono (Detroit).

Kiom ampleksa la "flortrafiko" estas, montriĝas el la fakto, ke jare pli ol 26 milionoj da florsalutoj realiĝas.

* * * * *

Rimarkindas, ke la gvidlibro de Interflora enhavas pri- kaj preskribojn rilate al floroj, plantoj kaj mendoj en 9 lingvoj. Tamen mankas Esperanto.

Kiel floristo, mi ofte devas uzi la gvidlibron de Interflora. Tamen, kion fari, se mendo ne estas plenumebla? Pere de la indikoj de la gvidlibro oni ne povas sufiĉe klare informi la kolegon.

Estante esperantisto, mi detale informas la kolegon en Esperanto. Ankaŭ la nomon kaj adreson de la UEA-delegito mi aldonas. La kolego, ricevinte la leteron, sed ne kapabla legi la tekston, tamen rekonas la nomon kaj adreson de la delegito. Scivola li iras al la delegito kaj ricevas tradukon de la letero. Tiel mi simple solvas aferojn. Ke Interflora ne jam uzas Esperanton en internaciaj rilatoj, estas fakto al mi nekomprenebla.

Espereble la estraro de Interflora baldaŭ konvinkiĝos pri la utilo kaj neceso apliki Esperanton en la funkciado de tiu ĉi unika organizaĵo.



Winnie la universala

Recenzas Jo Haazen (Belgujo):

Winnie-La-Pu*, de A.A. Milne. Tradukis Ivy Kellerman Reed, Ralph A. Lewin. Ilustris Ernest H. Shepard. Redaktis Humphrey Tonkin. Novjorko: E. P. Dutton kaj Kompanio, 1972. 164 p. Ilustrita. 19 cm.

Jen nova, tre tipa kaj alloga libro plena je riĉa, bele naiveta fantazio, ŝpinita ĉirkaŭ ursoĉjo Pu vivanta inter aro da afablaj bestoj, kiuj ege alparolas la imagpovon de infanoj: abeloj, kunikloj, strigo, azeneto, porketo, kangurao, "hefelanto" kaj aliaj ludemuloj. Urosoĉjo Pu estas de multaj bone konata. Ĝiaj travivaĵoj, origine anglalingvaj, tradukiĝis jam en dudekon da lingvoj. Flua esperantigo kaj tre karakterizaj desegnaĵoj. Gratulinde redaktis Humphrey Tonkin. La verko estas ŝajne informcele dotita per anglalingva enkonkuko pri Esperanto krom gramatikaj notoj kaj glosaro. Libro tre bona kaj rekomendinda al ĉiu. Precipe ĝuota de denaske esperantlingvaj infanoj.

Mendu ĉe UEA: broŝurita 9,66 (por Nederlando 10,05) gld., plus sendokostoj 10%. La prezo de la tolbindita eldono estos anoncita poste sub la rubriko *Laste aperis*.

* En la gazeto "Christian Science Monitor" (1972-08-16), vaste legata en Usono, aperis artikolo "Winnie-La-Pu en



Esperanto-lando", verkita de s-ro Duncan Charters kaj lia edzino Patricia. (Red.)

Moderna kurso precipe por klasoj

Recenzas Jean Thierry (Parizo):

A first course in Esperanto, de William Auld. Greenfield (Mass., Usono): Channing L. Bete Co., 1972. Serio "Scriptographic Booklets". 31 p. Ilus. 28 cm. Lernolibron oni taksas laŭ la aŭtora intenco: por kia publiko kaj rezulto? Jen post "Esperanto: A New Approach" kaj "Paŝoj al Plena Posedo" nova libreto, kiu (precipe destinita por lernejoj) prezentas didaktikan materialon por "elementa ... 10-leciona rapidkurso". Ses kasetaj sonbendoj igas ĝin aparte taŭga en lingva laboratorio.

La enhavo elprovita de instruisto-akademiano, kies nomo jam garantias la pedagogian valoron kaj gramatikan ĝustecon, konsistas ja el 282 lingveroj, kiuj, zorge elektite, aperas po 10 bazaj radikoj kaj de 10 ĝis 20 gramatikiloj kaj afiksoj en la lecionoj.

En la angla lingvo nur la elementojn akompanas ekvivalentoj kaj kelkajn gramatikajn punktojn komentas tre koncizaj notoj (entute 13). La cetera teksto, presita ruĝe kaj nigre por ilustris per ekzemploj la uzon de ĉiu nova elemento, koncernas la vortformadon kaj frazkonstruadon.

Ĉe la komenco troviĝas unu paĝo de klarigoj kaj la alfabetaj fonetikaj valoroj; post la tria kaj la kvina leciono unu kontrola teksto kun demandoj; kaj ĉe la fino post du tabeloj pri la korelativaj vortoj kaj la konjugaciaj formoj unu teksto-testo kaj ses konsiloj por plua lingvo-studado kaj praktikado.

Oni do ne pli postulu de la libro, ol kiom ĝi ambicias: ĉi tiu moderna metodo de "baza Esperanto" laŭ indukta-analiza principo sendube trafas sian celon de rapida kurso por asimili la lingvan strukturon. Cetere, ĉefe en neintelektula publika kurso restas al la gvidanto la zorgo riĉigi la bazan vorttrezoron.


Mendu ĉe UEA: 6,72 gld. (Nederlando 7,— gld.) plus sendokostoj 10%. Kompleto kun 6 kasetoj, 2 informbroŝuroj, 1 lernolibro ktp en skatolo kostas 140,— (por Nederlando 162,40) gld. plus sendokostoj. (La eldonejo draste malaltigis la antaŭe anoncitan prezon.)

Simbolo & vorto

Por tuja kompreno simbolo estas pli bona ol skribita vorto. Tiel argumentas Henry Dreyffus*, kompilinto de 8 000 universale kompreneblaj signoj, kiuj aperis en lia libro *Symbol sourcebook*, ĵus publikigita en Usono. Dreyfuss, kiu estas industria projektisto, kolektis sian materialon el diversaj fontoj kiel muzika notaro, astrologio, matematiko, la signoj faritaj de vagabondoj por komunikado al siaj kolegoj, kaj modernaj industrio kaj komerco.

— *Unesco Features*

* Vd.: "Esperanto", n-ro 784, p. 44-45.



Rekomendebla kompendio

Recenzas Ernesto Sonnenfeld (Urugvajo):

Compendio de Esperanto para adelantados, de Daniel Quarello. Buenos Aires: la aŭtoro, 1972. 193 p. 20 cm.

Detala lernolibro por hispanlingvuloj, precipe personoj finintaj jam elementan kurson, sed uzebla ankaŭ por komencantoj dezirantaj akiri firman bazon por ĝisfunda ellerno de nia lingvo. Rekomendebla por mezlernejaj studantoj. Kelkaj gramatikaĵoj eble estas tro detale prezentitaj, ekz. pri la predikato (tamen ne la specife Esperantaj apartaĵoj) kaj la disdivido de la vortoj laŭ komplikaj reguloj neoficialaj. La Esperanta lingvaĵo ĝenerale estas modela kun malmultaj esceptoj. "Grande utila" ne impresas bone; "infanino" estas hispanaĵo, kvankam akceptebla kiel sinonimo por knabino. "Sonu laŭte la sonorilon..." devus soni: "Sonigu..." (en "soni la retiriĝon" aŭ "nokto-mezon" la akuzativoj anstataŭas prepoziciojn). "Urugvio" apud *Urugvajo*, eksperimenta volapukaĵo, ne devus aperi en lernolibro. "Regio" ne estas simple *administración estatal*, ĝi estas la traduko de la franca vorto "régie" uzata por difinitaj ŝtataj entreprenoj (speciale monopolaj), ekz. Regio de Tabakoj. Notu jenajn sukcesajn vortkreaĵojn: geeduki (kun-eduki gelernantojn), gevidi, gesolaj.

Mendu ĉe UEA: 9,18 gld. (por Nederlando 9,55 gld.) plus sendokostoj 10%.



Novelaro de Nobelpremiito

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando)

Songó kaj maldormo sub la karpeneto, de Ivo Andrić. Tradukis el la serba lingvo Imbert Roger kaj Tišljari Zlatko. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1972. 79 p. 17 cm.

Verkoj de Nobelpremiitoj malofte aperas en Esperanto; verŝajne ili ĝenerale estas tro ampleksaj kaj artopostulaj por trovi tradukontojn pretajn oferi al ili necesan tempon kaj energion sen espero pri rekompenco kaj eĉ eldono. Tamen okazas, ke noveletoj kaj poemoj trairas la procezon, kiel nun en la kazo de tiu ĉi novelaro. Despli bedaŭrindas, ke la traduko ne estas kontentiga lingve kaj stile, — precipe ĝenas ofta manko de flua kaj akorda esprimado; malgranda literaro ankaŭ malhelpas daŭran legadon. Tamen, la rakonta kaj psikologia talento de Ivo Andrić ofte traasertas sin en la penetraj analizoj de personoj kaj situacioj en Bosnio sub la aŭstro-hungara okupado.

Mendu ĉe UEA: 9,72 (por Nederlando 10,11) gld. plus sendokostoj 10%.

LASTE APERIS...

Barbro kaj Eriko (1933) Alois Schneider kaj Magda Carlsson. 40p. Ilus. 21cm. 2,28 gld. Letera romaneto: korespondado inter du junaj geesperantistoj — aŭstro kaj svedino. Fotorepreso. Postkursa legolibro.

De kant' al kanto; 30 kantoj kun muziknotoj (1972) Eld. Tokia Esperanto-Kooperativo. El diversaj lingvoj tr. plejparte Konisi Gaku. 64p. 13x19cm. 3,12 gld. Nuntempaj kantoj japanaj kaj usonaj, po kelkaj originalaj kaj tradiciaj Esperantaj kantoj, plus diverslandaj popolkantoj. Gitarkodoj en aldono.

Farmakologio por malbonuzoj de medikamentoj (1972) S. Tadokoro. 15p. Mimeo. Ilus. 27cm. 4,80 gld. (Someraj Universitataj Kursoj). Lekcioj pri dependeco al medikamentoj kaj pri psikaj efikoj de medikamentoj.

Glufiŝeto "Esperanto parolata" 12 x 6 cm. Kvarlatera, plasta, kun verda kaj nigra preso sur blanka fono. 0,90 gld.


Ĝenerala kaj homa histologio (1972) Wim M.A. de Smet. 68p. Mimeo. 27cm. Ilus. 14,40 gld. (Someraj Universitataj Kursoj). Enkonduka superrigardo de la ĉeloj kaj histoj ĉe la bestoj kaj ĉe la homoj.

Matematikaj metodoj en lingvistiko (1972) Heinz D. Maas. 52p. Mimeo. 27cm. 12,— gld. (Someraj Universitataj Kursoj). Utila enkonduka prezento por laikoj.

Mediuma poemaro (1972) Luís da Costa Porto Carreiro Neto (1895-1964). Red. A.K. Afonso Costa. 119p. Frontispico. 23cm. 5,28 gld. Originalaj poemoj atribuitaj al la spiritoj de diversaj mortintaj aŭtoroj, inkl. L.L. Zamenhof.

Medunarodni jezik nekad i sad (1970) B. Popović. 47p. 17cm. 0,96 gld. Dua, kompletigita eldono de serblingva broŝuro pri la lingva problemoj kaj ĝia solvo per Esperanto.

Poŝtkartoj "Historiaj restaĵoj elterigitaj en Ĉinio" Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 12 kolorpresitaj bildkartoj pri antikvaj vazoj, statuoj kaj aliaj artaĵoj. Unu serio 0,50 gld.



Poŝtkartoj "Ruĝa Signal-lanterno" Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 14 kolorpresitaj bildkartoj pri moderna ĉina opero kun temo el la Kontraŭjapana Rezistmilito. Unu serio 0,72 gld.

Poŝtkartoj "Ruĝa Virina Taĉmento" Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 16 kolorpresitaj bildkartoj pri moderna ĉina baletoj pri la Dua Enlanda Revolucia Milito. Unu serio 1,08 gld.


Poŝtkartoj "Ŝagiabang" Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 12 kolorpresitaj bildkartoj pri moderna opero, kies ĝenerala fono estas la Kontraŭjapana Rezistmilito. Unu serio 0,72 gld.

Rakontoj kaj poemoj Ĝ. Ĥalil' Ĝibrán'. El la araba tr. Georgo Abrahám (1972). 150p. Ilus. 22cm. 12,78 gld. Poeziaj prozaĵoj kaj prozformaj poeziaĵoj de la mondo konata libana verkisto.

Voĉo de l' silento, La — kaj aliaj fragmentoj el la "Libro de la oraj preskriboj" Tr. H.P.B. 62p. Mimeo. 21cm. 6,— gld. Elektaĵo el tibeta sankta libro, kies origino troviĝas parte en la antaŭBudha, parte en la postBudha epoko. Kun detala komentario.

Voĉoj de Sándor Szathmári, La (1972) Disko 18cm. 33t/m. Duflanka. Monofona. 2,40 gld. Parolo de la hungara Esperanto-verkisto, aŭtoro de *Vojaĝo al Kazohinio*. Sen teksto. (La voĉalbumo de Esperanto, n-roj 13-14).

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.



LA ADVERBO

La nun preparata nova eldono de la Enciklopedio de Esperanto, kies unua, duvoluma eldono aperis antaŭ precize 40 jaroj, altiris al si, sub la ŝildo de STAFETO kaj aŭspicio de CED, la plej eminentajn kunlaborantojn el la tuta esperantlingva mondo. En la decembra numero ni publikigis specimene artikolon de N.Z. Maimon pri Bjalistoko. Ĉi-monate ni prezentas alian elstaran kontribuon al la nova Enciklopedio, verkita de la antaŭa direktoro de la Gramatika Sekcio de la Akademio, Douglas B. Gregor.

La aŭtoro
D.B. Gregor

Oni povas supozi, ke Zamenhof venis al la kreado de la adverbo nur post tiu de la substantivo (kaj/aŭ verbo) kaj de la adjektivo, diferencaj inter si nur laŭ la fina litero. Kiun literon do li elektu por la adverbo? Ŝajnas, ke *-e* prezentis sin kiel taŭgan jam de la komenco, ĉar troviĝas *tute* (*tute*) kaj *bloe* (*kontraŭe*, kune kun la adjektivo *bloa*) en lia traduko de la Andersena "La Ombro" en 1881 (*Leteroj de Zamenhof* 1, p. 353); kaj certe tiu litero same uziĝas en la slava kaj latina lingvoj. Sed ĉi tio rilatas nur la adverbojn derivitajn de aliaj (plejparte adjektivaj) radikoj; necesis ankaŭ adverboj originaj, kiel *nur*, *ankaŭ*, *jam* k.c. Zamenhof plejparte prenis ĉi tiujn sensanĝe el naciaj lingvoj: ekz. *jam* troviĝas en la "Lingwe Uniwersala" de 1878 (*LZ* 1, 347), kaj *nur* fine elpuŝis la *koj*, *ankaŭ* la *os*, kaj *nun* la *nuk* de 1881 (*LZ* 1.c. kaj *Esperantologio* 1,1,47).

La tabelo de korelativoj ŝajne ankaŭ estas dekomenca, ĉar en la citita fragmento de 1881 ni trovas *fej* (tial), *fe* (tiel), *fi* (tie), *kvan* (kiam), *c'ian* (ĉiam). Inter la rigore regulaj korelativaj kaj la sensistemaj adverboj troviĝas tria kategorio iagrade sistemigita per komuna finaĵo *-aŭ*. De kie Zamenhof prenis ĉi tiun sonon, oni povas nur konjekti: eble el *laŭ*, kiu, kiel sia fonto, la germana *laŭt*, estas prepozicio kaj verŝajne fariĝis la modelo por aliaj prepozicioj (ekz. *antaŭ*); de tie, eble tra la itala, ĝi transiris (unika kazo en Esperanto) al dua gramatika formo, la adverbo (*hodiaŭ* k.c.).

Egale arbitra ŝajnas esti la elekto, ĉu adverbo estu sensistema (sen finaĵo) aŭ sistema (en *-aŭ*): ekz. flanke de germana *nun* ni havas *baldaŭ*; ĉu do *bald* ne taŭgis pro koincido kun angla *bald* (senhara) (kaj ĉi tie Zamenhof scipovis la anglan sufiĉe!), aŭ ĉu, estante tempa vorto, ĝi devis konformiĝi al la tipo *morgaŭ* k.c.?

La fleksebleco de Esperanto nenie aperas tiel granda, kaj ĝia esprimpovo nenie tiel frapa, kiel ĉe la derivitaj adverboj. La potenca dinamiko de ĉi tiu fina *-e* por esprimi ne nur manieron, sed ankaŭ gradon, kaŭzon, tempon, celon, instrumenton, lokon kaj komparon, estas analizita en *Esperantologio* 2/2 (1961), p. 100-108.

Aparte utila estas ĝia uzo ĉe participoj, kie la diferencigo inter adjektiva kaj adverba signifoj estas grava ne nur semantike, sed ankaŭ pedagogie. Ne tiel kontentiga estas la kutimo uzi adverbon anstataŭ adjektivo por senpersonaj esprimoj (*estas varme*), almenaŭ

antaŭ la infinitivo (*estas pli bone silenti*) kaj aparte kiel komplementon de verbo esprimanta pensadon (*mi kredas oportune paroli*), kie dubesenco povas okazi, kiel Zamenhof mem konsciis (*Lingvaj respondoj*⁶ 82; v. *Scienca revuo* 1961, p. 45-48). Senduban pliriĉigon tamen el lingva vidpunkto konsistigas la ebleco aldoni ĝin al prepozicioj (*pere*, *anstataŭe* k.c.); kaj tiel ampleksema estas ĉi tiu finaĵo, ke ĝi aldoniĝas foje eĉ al aliaj adverboj (*tiele*, *nure* k.c.), tiamaniere ebligante ĉiuspecajn nuancojn. En *Sinjoro Tadeo* de Grabowski (1918) oni vidas ĝin eluzita ĝis maksimumo: kiel konstatas Kalocsay (*Lingvo Stilo Formo*, p. 57), en tiu verko troviĝas "la plej larĝa kaj vastsenca uzo de la adverboj, tiel ke la e-finaĵo post substantiva radiko formas kvazaŭ novan kazon, specon de ablativo, anstataŭante la plej diversajn prepoziciojn".

Devas subesti iu profunda lingve-psika kaŭzo por tio, ke el la tuta Esperanta vortfarado ĝuste la adverbo havas la plej grandan rolon.

Bibliografio: "Leteroj de Zamenhof", de G. Waringhien, vol. 1, Apendico, Paris 1948. "Fontoj de Esperanto", de D. B. Gregor, Purmerend, 1959. "Esperantologio", vol. 1, n-ro 1 kaj vol. 2, n-ro 2, Kopenhago, 1961. "Plena gramatiko", de Kalocsay kaj Waringhien, 3a eldono, Milano, 1964.

Pri Sindhujo

Skribas C. M. Houghton (Britujo):


En Esperanto, oktobro 1972, paĝo 162, oni skribas pri provinco Sindhujo kaj enloĝantoj Sindhoj. Tio ŝajnas eraro: la enlandaj nomoj, uzataj ankaŭ en la angla lingvo, estas Sindh (la provinco) kaj Sindhi (enloĝanto). Do en Esperanto oni devus nomi la provincon Sindho kaj la enloĝantojn Sindhanoj.

Respondas la redakcio:

La gentonomon *sindhoj* sugestas la ĉi-rilataj principoj de Zamenhof (vidu: *Lingvaj respondoj*, 18 B), kiuj, kune kun la efektiva uzado de lokaj esperantistoj, restos ja decidaj kriterioj ĝis la Akademio eldonos klarajn rekomendojn. Cetere la formo *sindhoj* pli, ol la propono *sindhanoj*, konformas al la esperantigo *hindoj* de sudazia vorto etimologie egalvalora. *Bengaloj*, *asamoj* samkaŭze preferindas.

Instruistoj lernas Esperanton

Novspeca kurso plensukcesis



**LERNEJA
BULTENO
N-ro 25**


**Redaktoro:
U.J. Moritz,
Blumenstr. 7
D-511 Als-
dorf, F.R.
Germanujo**

Klarvidaj esperantistoj jam delonge konscias, ke estas tre danĝere postuladi la rapidan enkondukon de ĝenerala instruado de la Internacia Lingvo: Se iu registaro — ni revu momenteton — decidus, ke la infanoj de la koncernata ŝtato ekstudu Esperanton post tri jaroj, ni eĉ ne disponus sufiĉe multajn kompetentulojn por dum tri jaroj eduki la necesan kvanton da diversgradaj instruistoj. Tial en diversaj ŝtatoj oni jam de pluraj jaroj klopodadas krei kapablajn Esperanto-instruistojn. Tamen, temas pri tasko tre malfacile plenumbla: Instruistoj kutime ne apartenas al la plej senlaboraj oficistoj. Do, ĉu studi apartan fakon ekster la normala deĵortempo? Kiun utilon havas koni kaj instrupovi tiun lingvon? Ĉu la ŝtato pagos miajn Esperanto-lecionojn? Ĉu tiu Internacia Lingvo ne estas konkurencaĵo por la instruado de la angla, rusa, franca ...? Malgraŭ tiaj kaj aliaj obstakloj jam okazadis porinstruistaj kursoj en Pollando, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Hungarujo, Jugoslavio kaj aliaj ŝtatoj.

En F.R. Germanujo valoran laboron faris kaj -as aktivuloj en Malsupra Saksujo aranĝante diversgradajn kursojn ĉiujare helpe de ministeria subvencio. En apuda provinco, Nordrejn-Vestfalio, de 1970 malgranda subsekcio de ILEI streĉegas siajn fortojn por konkurenci kun aliaj regionoj. La lasta ĝisnuna sukceso estis 6-taga kurso okazigita en la universitata lingvocentro de Bielefeld.

Tiu ĉi kurso kunvenigis inter la 9-a kaj 14-a de oktobro 1972 pli ol 20 personojn, inter kiuj estis 15 geinstruistoj kaj studentoj. En la kursoprogramo troveblis, kiel tradiciaĵoj, referaĵetoj pri la organiza strukturo de la Esperanto-movado, pri la lingvistika profilo de la studata lingvo, pri la nun aĉetebla Esperanto-literaturo ktp. Sed ĉio ĉi estis nuraj akcesoraĵoj.

Intensa studado en la lingvo-laboratorio de Bielefeld



La vera kurso estis io tute nova: La "lernantoj" laboris per sonbendoj en ĵus instalita lingvolaboratorio de la universitato de Bielefeld. Disponebis 29 sonbendoj de po 45 minutoj ellaboritaj surbaze de la materialo de la Behrmann-kurso "Esperanto-programita". Ĉar la kursanoj havis preskaŭ senescepte diferencon sciobazon pri Esperanto, ili povis komenci per plej diversaj bendoj, tiel ke manpleno atingis la finon eĉ de la 29a bendo post 5 studotagoj.

La studado estis ege streĉa: Ĉiutage oni sidis dum 4 kompletaj horoj super siaj bendoj kaj dum 2 horoj preparis sin aŭ partoprenis konversacian ekzercadon. Behrmann kaj lia asistanto kursofine donis al ĉiuj saman juĝnoton: grandioza laboremo. Tiu propravola intenseco de lernado certe estis kaŭzita parte de la instrumentado. Dum la tuta studunujo la lernanto mem fiksas sian laborritmon kaj eventuale ankaŭ la studkvanton, ĉar li/ŝi estas principe sendependa de la instruisto. La sonbendo enhavas la frazomodelojn, la uzendajn lingvajn elementojn kaj la laborinstrukciojn. Kiam la lernanto estas konstruita sian frazon, li/ŝi aŭdas la ĝustan frazon parolitan de la instruisto kaj ĝin ripetas por plifirmigi aŭ korekti siajn konojn. La lernanto povas libere haltigi kaj rebobeni la bendon por refari ekzercojn aŭ por aŭskulti siajn proprajn diritaĵojn. Krom la grandega memstareco (la instruisto kaŝaŭskultas kaj jen kaj jen enŝaltiĝas por korekti) menciindas alia gravega avantaĝo kompare al aliaj instrumentadoj: La lernanto senĉese paroladas kaj do, sen timi malestimon flanke de "pli talentaj" samgrupanoj, povas kutimiĝi al artikulaciado* de la fremda lingvaĵo. Tiu aspekto evidentiĝis eksterordinare interesa: Fine de la kurso bone parolis en Esperanto personoj, kiuj antaŭe eĉ ne unu frazon sukcesis translipigi, kaj eĉ de punkto nul startintoj povis diri kelkajn simplaĵojn kaj kompreni multon — post ses-taga lernado!

La organizintoj kontentas, sed ne ripozas. Jam estas fiksita la dua tiuspeca kurso: de la 3a ĝis la 8a de januaro 1973 en la universitato de Paderborn, Nordrejn-Vestfalio.

ILEI konferencis en Budapeŝto

De la 20a ĝis 23a de julio 1972 okazis en la hungara ĉefurbo la kunveno de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Estis kolektiĝintaj proksimume 60 geinstruistoj el Aŭstrujo, Bulgarujo, Danlando, Jugoslavio, Germana D.R., F.R. Germanujo, Italujo, Pollando, Rumanujo, Francujo kaj Hungarujo.

* artikulacii: artikigi en senco fonetika.

LERNEJA BULTENO

N-ro 25 (daŭrigo)

Dum la inaŭguro salutparolis interalie reprezentanto de la budapeŝta urbestro, d-ro Gyula Mezei, kiu substrekis la konvinkitecon de la hungaraj edukaj instancoj pri la grava rolo ludata de Esperanto por klerigado kaj internaciaj rilatoj ankaŭ de la junularo. Li menciis fiere, ke en pluraj ĉefurbaj lernejoj ekzistas deviga instruado de la Internacia Lingvo. La Festparoladon faris Helmut Sonnabend, vicprezidanto de ILEI kaj estro de unuagrada lernejo en FRG, parolante pri la temo "Demokratiigo en la lernejo, plibonigo de ŝanca justeco".

La programo de tiu konferenco, cetere harmoniigita kun tiu de la Hungara Kulturfestivalo, ampleksis du prelegojn, diversajn laborkunsidojn koncerne la nun jam dujare efektivigatan instrueksperimenton, estrarkaj komitatkunsidojn de ILEI, akceptiĝon de delegacio ĉe la eduka aŭtoritato de Budapeŝto kaj ekzamenon. — Prof. d-ro I. Szerdahelyi prelegis pri "La universitata propedeŭtiko de Esperanto kaj ĝia aplikado en lerneja instruado", kaj Géza Kurucz parolis pri la baldaŭ aperonta porlernejana revueto "Juna Amiko". — La ĝenerala sekretario de ILEI, d-ro Dazzini, raportis pri la stato de la asocio, indikante i.a., ke ĝi havas 24 sekciojn en ĉiuj kvin kontinentoj. Pri la plivastigo de eksperimenta instruado li informis, ke la ILEI-komitato dividis la mondon en diversajn zonojn, kies ŝtatoj kune konsistigu eksperimentajn regionojn.

Vastigi eksperimentan instruadon

La konferencanoj unuanime akceptis jenan rezolucion:

La konferenco de ILEI, unuiĝo de pli ol 20 landaj ekzistantaj instruistaj sekcioj, fondita en la jaro 1949 kaj agnoskita de Unesko la 13. 10. 1952, okazinta de la 20a ĝis 23a de julio 1972 en la kadro de la Hungara Kulturfestivalo en Budapeŝto,

konsiderinte, ke ĉefa rolo de iu ajn lingvo estas interkompreniĝo kaj ke la internacia lingvo Esperanto perfekte realigas la aspirojn kaj postulojn de la lernantaro por rekta interkompreniĝo en kontakto de homo kun homo,

konsiderante la solvon de Esperanto kiel plej modernan sciencan propedeŭtikon rilate al la studado de modernaj fremdlingvoj kaj por la kono de la kulturoj de diversaj popoloj,

ne preterlasante la gravan rolon, kiun Esperanto disvolvas por la defendo de ĉiuj naciaj lingvoj kaj kulturoj daŭre minacataj en iliaj esencaj valoroj,

substrekante la utilon de Esperanto pro ĝia maksimuma ekzaktesco en la ĝeneralaj lingvistikaj studoj kaj aparte en la moderna lingvistika koncepto, rekomendas

al ĉiuj ŝtataj kulturaj kaj edukaj instancoj pristudi la eblecojn, disponigitajn de la internacia lingvo Esperanto kaj akceli ĝian instruadon kiel eble plej vaste, permesante eksperimentan instruadon laŭ la jam funkciantaj modeloj en diversaj ŝtatoj.

En la kadro de tiu ĉi ILEI-konferenco okazis ankaŭ la 6a Kunordiga Konferenco (regiono 1) por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn, la 18an kaj 19an de julio. Dudeko da geinstruistoj aŭdis kaj diskutis la raportojn koncerne la en 1971 komencitan komunan eksperimenton en Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio. La ĉefaj punktoj interesaj ankaŭ por kolegoj ne rekte koncernataj per la eksperimento estis: la referaĵo de Helmut Sonnabend pri "Formoj de eksterklasaj aktivecoj de gelernantoj kaj praktika aplikado de lingvaj kapabloj" (kies teksto aperis broŝure kaj estas havebla ĉe H. Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11 a, D-3161 Dollbergen); la informo pri tre baldaŭa apero de la tute internacilingvigitaj volumo 1 de la lernolibro de prof. Szerdahelyi, kaj la raporto de d-ro P. Zlatnar pri kromefikoj de la eksperimento en Slovenujo (komparu p. 182 de "esperanto", nov. 1972). — Rekte rilate la eksperimenton estas konstatende, ke kelkaj partoprenantaj instruistoj ne sufiĉe akurate sendas la testo- kaj aliajn materialojn kaj eĉ iukaze malrespektas la interkonsentojn koncerne lernolibron ktp. Oni intencis enkonduki, dum septembro 1972, kelkajn tute freŝajn eksperimento-klasojn.

ILEI havos sian venontjaran internacian konferencon kune kun la 7a Kunordiga Konferenco de la 21a ĝis 27a de julio 1973 en Maribor, Jugoslavio.



Aperis provnumero de "JUNA AMIKO", "Internacia Lerneja Esperanto-Revuo"

Post plurjara penado de dekoj da spertaj esperantistoj en la tuta mondo, fine aperis nova alloga revuo *Juna amiko*. La Revuo celas precipe la lernejanon, sed ĝi certe altiros multajn ekster-lernejajn legantojn.

Juna amiko estas ideala legaĵo por komencantoj. Simpla lingvaĵo, amuza, tre varia enhavo kaj formo igas ĝin alloga. Ne nur la titolo fanfaronas per la epiteto "Internacia", sed efektive la redakcion formas 24 personoj el 18 landoj. Tio estas reala garantio pri vera internacieco.

Juna amiko ampleksas 24 du-kolore presitajn paĝojn en formato 19 x 14,5 cm kaj estas ilustrita 50-procente.

Tiun Internacian Lernejan Esperanto-Revuon eldonas Hungara Esperanto-Asocio, kaj ĝi estas aĉetebla ĉe la landaj Esperanto-asocioj.

KONCIZE EL ...

Belgujo

• Fine de la pasinta lernojaro s-ro Germain Pirlot faris opinienketon en gimnazio de Dinant, teknika lernejo de Jemelle kaj porinstruista instituto de Vinton kaj dum kunveno de la Eŭropa Edukista Asocio en Gent. Sume 92 personoj respondis. Jen la demandoj kaj la rezultoj en procentoj:

- 1) Ĉu vi jam aŭdis ion pri Esperanto? JES: 86,4, NE: 13,6.
- 2) Ĉu vi havas sciojn de Esperanto? JES: 2,3, MALMULTAJN: 10,2, NE: 87,5.
- 3) Ĉu vi aŭdis ion pri eksperimentoj por la enkonduko de Esperanto en la instruado aŭ pri la Someraj Universitataj Kursoj en Liège tute en Esperanto? JES: 6,8, NE: 93,2.
- 4) Ĉu vi kontraŭstaras enkondukon de Esperanto en la lernejoj kiel fakultativa fako? JES: 21,6, NE: 77,3, INDIFERENTE: 1,1.
- 5) Ĉu vi deziras dokumentaron pri tiu lingvo? JES: 81,8, NE: 18,2.

Inter la argumentoj kontraŭ Esperanto estis plej frapaj jenaj: nenatura lingvo; ekzistas jam sufiĉaj lingvoj; dio kreis lingvojn por starigi barojn inter la homoj, do, komuna lingvo estas kontraŭ la volo de dio.

• En Welkenraedt, nordorienta provinco de Lieĝo, komenciĝis kurso kun pli ol 20 gelernantoj kaj du instruistoj. Gvidas tiun aktivecon s-ino Vertongen, kiu jam en la proksima Eupen simile laboradas.

Francujo

• Multaj instruistoj vizitis la "vojaĝantan" Esperanto-ekspozicion, kiun nordfrancujaj aktivuloj prezentis en Lille, Houdain, Liévin kaj Lillers. En tiu ĉi lasta urbo la instancoj kaj regiona gazetaro vaste propagandis la aferon.

Esperantista laborkunveno decidis agadplanon, kiu antaŭvidas i.a. ĉiujaran aktualigon de informiloj, liveron de Esperanto-literaturo al publikaj bibliotekoj, debatojn pri la Internacia Lingvo en seminarioj de la pedagogia movado Freinet k.s.

• Inter la 4a kaj 10a de julio 1972 20 gelernantoj el la kantono Solliès-Pont (norde de Toulon) vizitis kun siaj geinstruistoj Mathis la italan urbon Torino, pri kies gastigemaj esperantistoj ankoraŭ volonte parolas la infanoj. — Ankaŭ ĉi-jare okazas kursoj en tiu kantono: 34 geknaboj kaj 5 plenkreskuloj enskribiĝis.



Ges-roj Mathis kun kelkaj el siaj gelernantoj

Forpasis franca pioniro

NEKROLOGOJ

GABRIEL CHAVET (1880-1972)

La plej aĝa membro de Veterana Esperantista Klubo, Gabriel Chavet, mortis en la 23a de oktobro en Parizo. En la jaro 1905 li fariĝis sekretario de la Esperantista Centra Oficejo kaj, de 1906 ĝis 1914, organizis la Universalajn Kongresojn kiel ilia ĝenerala sekretario. Lia agado estis larĝaskala. Krom fondi, jam de 1897, lokajn Esperanto-grupojn kiel pioniro en Francujo, li aktivis en la medio de pacifistoj, rotarianoj kaj poŝtistoj. En 1907 li verkis lernolibron *Espéranto-Manuel* kun Warnier, en 1912 *Corrigé d'Espéranto-Manuel* kaj poste francan-Esperantan vortaron. Li estis krome unu el la kunlaborantoj por *Enciklopedio de Esperanto*, eldonita en 1933.

Membro de la Lingva Komitato ekde 1909, li prenis sur sin ĝian sekretarian laboron, redaktis la gravan *Oficiala Gazeto Esperantista* kaj multajn eldonaĵojn de la Esperantista Centra Oficejo.

BENITO LOSADA

Mortis 80-jara Benito Losada, pioniro de la Esperanto-movado en Venezuelo (je 1972-07-31). Li fondis la unuan Esperanto-klubon en Venezuelo en la jaro 1912 kaj la landan Esperanto-asociacion en 1947. Kiel ĝia prezidanto li funkciis ĝis sia morto. Inĝeniero Losada ellernis la Internacian Lingvon aŭtodidakte kaj ĝin instruis al multaj samlandanoj. Ŝtato de beletristiko, li verkis poemojn kaj tradukis plurajn el la venezuela literaturo.



Benito Losada



Imre Ungár

IMRE UNGÁR (1909-1972)

La 22an de novembro forpasis Imre Ungár, la konata hungara fortepianisto, profesoro de la Hungara Muzika Altlernejo. Li eklernis Esperanton en sia 12a jaro kaj ofte akceptis invitojn al Esperantaj aranĝoj, i.a. kiel preleganto en la Internacia Somera Universitato en 1966. Spite al blindeco de post la tria vivjaro, li atingis eminentan pozicion en sia arto, gajnis la unuan premion en la internacia Chopin-konkurso en Varsovio en 1932 kaj faris plurajn koncertvojaĝojn.

FELICE MIUCCIO

Post 11-hora operacio ĉe la koro, por kiu pluraj esperantistoj en Romo donis sian sangon, forpasis en kliniko je 1972-11-17 Felice Miuccio, fakdelegito de UEA en Messina, Italujo, estante nur 46-jara.

58^a

UNIVERSALA
KONGRESO DE
ESPERANTO
28.7. - 4.8.
1973.
BEOGRAD



Beograd jam konkreteĝas

58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Beograd, 1973 07 28 – 08 04.

Alta Protektanto: Prezidanto de Jugoslavio, Josip Broz Tito

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

KKS en Beograd

Dum sia dua ofica vizito al Beograd en novembro 1972 la KKS Nevan kune kun la LKK decidis principe akcepti por la kongresejo la konstruaĵon de "Sindikata Domo", troviĝantan en la centro de Beograd. Apude situas aro da diverskategoriaj hoteloj por konvena loĝigo de la kongresanoj. Detaloj aperos en la Oficiala Bulteno (Dua) komence de februaro 1973.

GENERALTURIST — la kongresa agentejo

Laŭ aparta kontrakto, unu el la plej grandaj vojaĝ-entreprenoj de Jugoslavio, agentejo GENERALTURIST, kunlaboras kun la LKK cele al profesia priservo de la partoprenantoj de la 58a UK. Generalturist peros la loĝigon, ekskursojn kaj aliajn laborojn por utilo de la LKK.

Unuaj karavanoj al Beograd

Diversajn aranĝojn por grupe vojaĝi al la kongresurbo jam anoncis Brita E-Asocio (140 Holland Park Ave., London W11 4UF), Unuiĝo Franca por Esperanto (34 rue de Chabrol, F-75010 Paris), la nederlanda asocio L.E.E.N. (p/a F-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, II, R, Rotterdam 3002) kaj la usona asocio E.L.N.A. (p/a EIC, 410 Darrell Road, Hillsborough, Calif. 94010).

Kanto-vespero ripetota

La granda sukceso de la kanto-vespero en Londono 1971 instigis la kongresorganizantojn denove enprogramigi "Vesperon de Esperanta Kanto kaj Kanzono" dum la beograda kongreso. Ĉiuj kantistoj, kiuj havas en sia repertuaro kantojn aŭ kanzonojn en Esperanto (originalajn aŭ tradukitajn) estas invitataj skribi al la konstanta adreso de la kongreso.

Anoncoj serĉataj

Al ĉiu, kiu deziras preni la okazon por publikigi anoncon en la Oficiala Bulteno aŭ/kaj la Kongresa Libro 1973, la LKK proponas ekonomian tarifon. Petu ĝin ĉe la kongresa adreso.

Fervoja rabato

Kiel partoprenanto en la internacia konvencio, Jugoslavio asignas 25%-an rabaton por vojaĝantoj al internaciaj kongresoj ktp. je aĉeto de irrevena fervoja bileto.

Statistiko (1972-12-21)

Aliĝis entute 355 personoj el 33 landoj.

INFORMOJ PRI LA 29-a I. J. K.

Datoj: de sabato la 21a ĝis vendredo la 27a de julio 1973 (t.e. tuj antaŭ la 58a Universala Kongreso en Beograd).

Loko: Sarajevo, la natura kaj geografia centro de Jugoslavio, ĉefurbo de la Socialisma Respubliko Bosnio kaj Hercegovino, — urbo plena je kontrastoj, en kiu senĉese miksiĝas la pasinteco kun la nuntempo, la urbo, kiu ludis kaj ludas gravan rolon en la ĝenerala historio de Eŭropo.

Kongresejo: Domo de Junularo, tute moderna konstruaĵo speciale destinita por ĉiuspecaj junularaj aktivecoj kaj provizita per taŭgaj kunvenejoj, amuzejoj kaj teknika ekipaĵo.

Loĝigo/Manĝigo: Ĉiuj loĝos kaj manĝos en la luksa Studenta Hotelo "Indeks", 8-etaĝa konstruaĵo finkonstruita antaŭ nur unu jaro, en kiu disponeblas du- kaj tri-litaj ĉambroj.

Ĝenerala Temo: La oficiala temo de la kongreso estas: "Junularo kaj la Hom-medio", kun prelegoj, referaĵoj kaj diskuttrondoj.


Programo: Laborkunsidoj, seminarioj, kultur-amuzaj aranĝoj, renkontiĝoj kun la loka junularo, studvizitoj, ekskursoj kaj aliaj publikaj manifestacioj.

Kotizoj: La kongres-kotizoj, fiksitaj en usonaj dolaroj, kaj laŭ la kategorioj M = individuaj membroj de UEA/TEJO kaj N = neindividua membro de UEA/TEJO, estas jenaj:

aĝo sub 20 jaroj:	30 (M) kaj 33 (N) ĝis 31.03.73, 33 (M) kaj 36 (N) ĝis 20.06.73,
inter 20 kaj 25:	33 (M) kaj 36 (N) ĝis 31.03.73, 36 (M) kaj 39 (N) ĝis 20.06.73,
pli ol 25:	36 (M) kaj 39 (N) ĝis 31.03.73, 39 (M) kaj 42 (N) ĝis 20.06.73.

Bankokontoj: *Jugobanka*, sjedište Sarajevo, 29. Mejdunarodni omladinski kongres, n-ro 101-620-10-3096-4821.

Adreso de LKK: 29a I.J.K., YU-71 000 Sarajevo, V. Pelagića 8/I, Jugoslavio. Kiel prezidanto de LKK funkcias la TEJO-estrarano Senad Ĉolić.



TEJO-PAGŬO

TEJO-redaktoro: G. D. Winkler

Jaegerstr. 27, D-42 Oberhausen-Sterkrade, F.R.G.




El Argentino

Antaŭ kelkaj monatoj ni informis, ke gvidadon de ArgentEJO transprenis nova, juna kaj idealisma teamo. Ĝenerale ilin alfrontas konataj problemoj: la membroj en la diversaj kluboj ja skribas la lingvon, per la korespondado, sed ili ne havas veran devigan praktikan uzadon de la parolata lingvo, do en la klubejoj multaj estas mutaj kiel fiŝoj, enuas, hontas kaj eliras (kelkaj por ĉiam). Ili postulas de la movado aktivan, pozitivan laboron; sed, kvankam en Argentino lingva problemo ne ekzistas (ĉiuj parolas la hispanan), tamen, kie estas aktivuloj, kiuj atentigas pri la problemo, ĉiam estos iom da sukceso. Montris tion denove d-ro Ruben Feldman Gonzalez per sukcesa gvidado de nova klubo en Firmat: stariginte kurson, farinte prelegojn, enkondukante regulajn kunvenojn ĉiusemajnajn kaj propran Esperantan bibliotekon li sukcesis vekti dum nur duonjaro sufiĉe da intereso. Do en '73 verŝajne jam estos du bazaj kaj unu supera kurso de Esperanto en Firmat.

Se vi volas kontakti kun junaj argentinanoj, skribu al: F-ino Terezita Alinisz, Lavalle 1919-6e/25 Buenos Aires, Argentino.

Nova nomo: AIDMLK

La Asocio Internacia por la Defendo de Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj kunvenis fine de julio en Aŭstrujo, kaj partoprenis la kunsidojn ankaŭ tri reprezentantoj de TEJO, kiuj poste povis raporti kun kontento pri la decido de AIDMLK adopti la Esperantoformon de sia nomo kiel oficialan.



EN LA KONGRESURBO DE LA 29-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO: SARAJEVO

Pitoreska panoramo de la urbo kun perspektivo de la multaj pontetoj, kiuj ligas la bordojn de Miljacka, monta rivereto, kiu elfluas el mallarĝa rok-pasejo kaj poste fekundigas per facila arko la valon de Sarajevo.



Malgraŭ la raportitaj "ideologiaj diferencoj kaj internaj problemoj", gaje mienis la partoprenantoj de japana tutlanda "kunloĝado" en Yaizu.

Verŝajne lastfoje pri TEJA

Dum pluraj jaroj Tokia Esperantista Junulara Asocio estis la elstara junulara rondo en Japanujo; ĝi havis inter 200 kaj 300 membrojn, kiuj gvidis aron da kursoj, organizis renkontiĝojn kaj eĉ eldonis regulan organon, la sufiĉe bonkvalitan *Nova Tajdo*; pro ideologiaj diferencoj kaj aliaj internaj problemoj bedaŭrinde la asocio likvidiĝis meze de la jaro 1972, tamen tio ne signifis, ke malaperis la tokiaj junaj esperantistoj kaj ni forgesu pri ili. Jen, kvankam sufiĉe malfrue, vi vidas foton de la lasta tielnomata "kunloĝado" (semajna renkontiĝo), kiu okazis majo '72 en la urbo Yaizu.

Junularo aktivas — sed kiu scias tion? !

Alvoko de la TEJO-redaktoro

Jam plurfoje oni demandis nin: "Kial denove vi metis raporton kaj foton pri tiu lando; kial ne ion el iu alia; kial ne estis artikoleto el mia lando? Vi ne informas pri nia rondo, landa sekcio, klubo; ankaŭ ni aktivas".

Ĝenerale ni respondu al ĉiuj tiuj petoj, plendoj, proponoj: ni tutkore invitas ĉiujn rondojn, aktivulojn kaj asociojn junularajn sendi mallongan raporton pri tio, kio okazas ĉe ili, laŭeble kunsendante bonan foton, kiu montru kunvenejon, anaron, ktp.

Ni tute samopinias, ke krom tiuj menciitaj kaj publikigitaj en la informoj ekzistas multaj aktivaj rondoj kaj grupoj, pri kiuj certe indus, eble eĉ endus raporti; tamen unue ni bezonus iliajn vivosignojn. Eĉ estus la plej bona solvo, se ĉiu klubo sendus aŭ foton aŭ raporton pri la agado, — certe estus instigo ankaŭ por viaj klubanoj vidi sin eventuale en unu el la sekvontaj numeroj; tiel ankaŭ plivigliĝus via klubavivo.

Pri semajnfino de NEJ en Nijverdal

Fine de la monato oktobro Nederlanda Esperanto-Junularo denove invitis al unu el siaj konataj semajnfinoj. Ĉifoje ĉeestis trideko da gejunuloj, inter ili multaj komencantoj, kiuj dank'al la TELEAC-kurso kontaktiĝis kun la Internacia Lingvo, kaj ankaŭ sufiĉe forta areto da germanaj gastoj. Krom la rakontoj de s-ro Kuster pri la regiono Twente, lumbildprelegoj kaj organizaj kunvenoj, kompreneble ĉefan intereson kaptis la nokta promeno en la apuda arbaro.

LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Francujo

- Dum la tuta novembro 1972 okazis ekspozicio en la urbo Perpignan, Francujo, okaze de la Internacia Libro-Jaro. Krom historiaj kaj literaturaj verkoj estis montrita ankaŭ la nova lernolibro *Je parle Espéranto* de J. Thierry. Atentis la ekspozicion la gazetaro kaj radio.

Italujo

- Mallongajn esperantlingvajn resumojn de siaj artikoloj enkondukis, apud la resumoj en la franca kaj hispana lingvoj, la anglalingva industri-propaganda luksa revuo *Italy's contribution to the promotion of world-wide prosperity*.

Madagaskaro

- Manpleno da novaj esperantistoj, luante oficejon por Malagasa Instituto por la Disvastigo de Esperanto, komencis sisteme agadi precipe por enkonduko

de Esperanto al radio-stacio kaj por okazigo de kursoj sur loka nivelo.

Senegalo

- En Senegalo, kie la oficiala lingvo estas la franca, oni komencos uzi tribajn lingvojn en eksterurbaj regionoj por la kontraŭanalfabetisma programo. La Centro de Aplikata Lingvistiko en Dakar la programon jam preparis en la lingvo Ŭolof kaj plue ellaboras en aliaj 5 tribaj lingvoj.

FAKE

Filatelo

- En la bulgara urbo Pazarĝik okazis en novembro filatela ekspozicio distrikta, i.a. kun sekcio "Esperanto en Filatelo" de Ljubomir Leviĉarov. La sekcio ampleksis pli ol 160 albumfoliojn kaj ricevis la plej altan premion.

Religio

- En la oka de oktobro, la "Esperanta Diservo en Londono" celebris sian sesdekan datrevenon. Fondita en 1912, de la bonkonata esperantisto Montagu Butler, la ĉiumonataj Diservoj okazis preskaŭ senĉese post tiu dato. Unue oni uzis privatan domon, sed nuntempe gastigas ĝin la Franca Protestanta Preĝejo en Soho.

Scienco

- Je la jarfino aperis ĉe la eldonejo Editions Matignon (Parizo) franca traduko de la sciencpopul-ariga verko *Senĝenaj dialogoj*, verkita originale en Esperanto de Alberto Fernández. Tiu eldono okazis eksterserie sub la titolo *Dialogues insolites*. La tradukon prizorgis la aŭtoro mem, kiu cetere aktive preparas version en la nederlanda lingvo.

Tradukado

- Laŭ la ĵus aperinta jarlisto de Unesko pri tradukaĵoj, *Index Translationum*, la tradukado en la mondo plu kreskadas. Kompare kun 38 172 tradukaĵoj el 65 landoj en la jaro 1969, la sumo de la tradukaĵoj en 1970 estis 41 322 el 73 landoj.

Turismo

- Dum la jara konferenco de Internacia Akademio de Turismo en Madrido, la ĝisnuna prezidanto, Prof. Alain Guillerrou (Sorbono), kritikis la kreskantan tendencon de lingvaj eraroj en menukartoj de hoteloj kaj restoracioj. Li pruvis tion per menukartoj el diversaj landoj, kiujn li ekspoziciis dum la konferenco. Guillerrou rekomendis al la Akademio, ke estonte ĝi dediĉu apartan atenton al tiaj lingvaj eraroj en menukartoj kaj ke ĝi konigu al la hotelestroj la korektajn terminojn.


PERSONE

Jung

- La honora membro de UEA s-ro Teo Jung, fondinto de *Heroldo de Esperanto*, verkisto, akademiano ktp., festis en la 21a de decembro sian 80-jaran datrevenon. Ni deziras al li ankoraŭ multajn jarojn da aktiveco en la movado!



Esperanto-klaso de la lernejo en Ziemeri, Latvujo (Soveta Unio) faris fine de oktobro ekskursvojaĝon tra la najbara respubliko Estonujo kaj vizitis tie la tombon de la konata originala Esperanto-poeto Hendrik Adamson. Je tiu okazo florkronon al la tombo alportis en la nomo de la verkistoj de Latvujo la poetino Elza Plukša. (Vidu la tradukon el ŝiaj verkoj sur la paĝo 15.) Sur la foto parolas la UEA-delegito en Törva s-ro Ants Pruler.



Frosta neĝo

de Elza Plukša

Post frosta nokt' maten' aŭtuna venas,
Funebras la natur' kaj floroj svenas,
Sub matenfrosta neĝo kaj sen ŝtormo
Asterojn, floksojn prenas morta dormo.

Nur sekalkampo ĝermas verdvelura,
Por ĝi burĝonas vivprintemp' plezura,
Rezistos vintre ĝi la frostkoŝmaron,
Somere maturigos orspikaron.

Se frosta neĝ' sur viajn ŝultrojn falas,
De viddoloro viaj vangoj palas,
Similu sekalkampon en rezisto,
Kaj savos de pereco vin persisto.

El la latva lingvo tradukis: Arturs Kubulnieks

EL NIA ANEKDOTARO

La aŭtobuso estis plenplena de pasaĝeroj. Multaj el ili devis resti stare sur la planko. Kiam la ŝoforo subite faris iom akran kurbon, juna knabo, preskaŭ faletante, ekkaptis la longan barbon de grizharulo, kiu staris apud li. "Lasu mian barbon!", kriis la maljunulo en granda kolero. "Kial?", demandis la knabeto, "Ĉu vi devas eliri ĉe la proksima haltejo?"

La edzino de sinjoro Kruko estis mortinta kaj entombigita. Kelkajn horojn post la funebra ceremonio la paroĥestro venis viziti la loĝejon de Kruko kaj trovis lin ĉetale kun duonplena botelo da alkoholaĵo antaŭ si.

"Diru, kompatindulo, ĉu tio estas via sola kaj lasta konsolo?" — demandis la ekleziulo iom indigne. "Ne, mia pastro" — diris Kruko, — "mi havas ankoraŭ plenan botelon en la ŝranko!"

La instruistino de Marko estas graveda. La infanoj en la klaso estas informitaj kaj eĉ scias, ke ŝia 'benita stato' kelkfoje influas ŝian humoron. Marko, reveninte hejmen, iun tagon, de la lernejo, diras: "Denove nia klas-estrino terure furioziĝis. Mi kredas, ke ŝi naskos ĝemelojn!"

En la unua klaso de kristana elementa lernejo, la pastro klarigas la historion de la biblio. Li demandas al Ludoviĉo: "Kiom longe Adamo kaj Eva restadis en la paradizo?"

"Ĝis la aŭtuno, sinjoro pastro."

"De kie vi prenis tiun strangan ideon?" — demandas, ŝokite, la pastro.

"Ĉar ne antaŭ aŭtuno maturiĝas la pomoj, sinjoro pastro."

Dum politika elekto-kampanjo frizisto en Meksiko demandis al unu el siaj klientoj, kiun li estis razanta: "Kiun kandidaton vi favoras?"

"La vian" — respondis senprokraste la razata viro.

"La mian?" — demandis la frizisto, mirigite. "Sed vi ja ne scias, kiun kandidaton mi preferas! Vi eĉ ne konas miajn politikajn tendencojn?"

"Ne, vi pravas, sed vi tenas akran razilon en la mano."



Je iu malvarma vespero en aŭtuno viro venas hejmen, malseka de la piedoj ĝis la kapo. Demandas lia edzino, tute mirigite: "He, ĉu pluvas?"

Furioze li respondas: "Kompreneble! Pluvegas. Kion vi pensis, ĉu ke mi ŝvitas tiom?"

Optikisto *inicas* sian filon en la arton de vendado. — Se kliento elektis okulvitrojn, li poste demandas al vi la prezon. Vi respondas: "200 guldenojn", kaj, se la kliento ne reagas, vi daŭrigas: "por la *muntumo*, kaj la prezo de la vitroj estas: 100 guldenoj"; denove vi atendas iomete, kaj, se la kliento ne montras surpriziĝon, vi kuraĝe aldonas: "por ĉiu".

En la tribunalo la juĝisto direktas sin al la akuzito, dirante:

"Vi do deziras, ke la sesio estu prokrastata pro tio, ke via advokato estas malsana? Mi ne bone komprenas viajn motivojn, ĉar vi estis arestita *kun la peko en la manoj*, vi konfesis vian kulpon, sekve mi vere ne vidas, kiajn mildigajn cirkonstancojn via defendisto povus ankoraŭ alporti..."

Respondas la kulpigito: "Estas ĝuste tio, kio ankaŭ tiom interesas min, juĝista moŝto!"

Ĝisosta avarulo sidis en preĝejo je iu dimanĉo. Li tute malatentis ĉion, kio okazis ĉirkaŭ li. Subite venis al li la *kvestisto* kun telero en la mano. Nia avarulo, viktimo de *distriĝemo*, metis la manon en la poŝon kaj prenis la unuan *renkontitan* bileton. Ĵetinte ĝin en la teleron, li ekrimarkis, kun granda konsterniĝo, ke li for-donacis mon-bileton de dek guldenoj. Li ne kuraĝis repreni ĝin sed poste cerbumis la tutan semajnon kiamaniere li povus ripari la domaĝon. Fine li trovis solvon. En ĉiuj sekvaj dimanĉoj, kiam rondiradis la preĝeja kvestisto, li flustris al li: "Dumviva membro".

Klarigoj:

inic-i: enkonduki (en iun arton, branĉon de industrio); konigi al iu la sekretojn de iu arto aŭ scio; ensekretigi; inicito = persono, kiu estas enkondukita en iun sciencon, arton, problemon, religion ktp. (Nur inicitoj rajtas juĝi pri la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo). munt-um-o: derivaĵo de la verbo "munti" (= kunigi la diversajn partojn de instrumento, aparato, maŝino ktp.) La muntumo de okulvitroj estas la kadro (framo), en kiun oni fiksas la vitrojn.

kun la peko en la mano(j): en la momento de la nepermesita ago aŭ krimo; ĉe la freŝa faro.

ĝisosta: (avara) ĝis la ostoj, ekstrema, senlima, eksterordinara;

kvestisto: de la verbo "kvesti" (= kolekti monon por religiaj celoj).

distr-iĝ-em-o: emo alistriĝo: kvalito de homo, kiu facile absorbiĝas en pensoj; malatentemo. Distriĝema profesoro. La vorto povas ankaŭ signifi: emo al amuziĝo; kvalito de homo, kiu ne tro serioze okupiĝas pri problemoj; senzorgemo;

renkontita: Per la esprimo 'la unua renkontita' oni volas diri 'la unua, kiun oni renkontas aŭ trafas'. La unua renkontita strat-bubo povas diri al vi, kie okazas la festivalo. Li ekkaptis la unuan renkontitan okazon por venĝi sin (= la unuan okazon, kiu prezentiĝis).



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1972, Dua Parto, p. 338. Mallongigoj: I = Informoj; P = parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs). I. P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 41.99 m (7145 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

Dimanĉe

10.30-11.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

11.00-11.30 Pekino, 72.63 m (4130 kcs), 57.40 m (5220 kcs), 47.69 m (6290 kcs), 40.18 m (7470 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

12.30-13.00 Pekino, 86.43 m (3500 kcs), 71.43 m (4200 kcs), 54.10 m (5545 kcs), 25.04 m (11980 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Rádio Clúbe de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

12.20-12.30 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs), 13.90 m (21585 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

Marde

16.45 — 17.00 Bratislava, 68.84 Mcs (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 Mcs, 69.20 Mcs, 69.50 Mcs, 69.68 Mcs. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.

Merkrede

12.20-12.30 Bern, kiel lunde (s-ro Gacond).

13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A 1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvon merkredon.)

19.30-19.45 Sabadell, 203 m (1475 kcs), 89.1 Mcs (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaŭde

16.35-16.50 Bratislava, kiel marde.

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590

kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.27 m (11870 kcs), P. (d-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 Mcs (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63 Clermont-Ferrand, Francujo.

20.00-20.30 Pekino, 58.20 m (5162 kcs), 47.84 m (6270 kcs), 47.61 m (6300 kcs), 45.38 m (6610 kcs), 44.00 m (6825 kcs), 31.98 m (9380 kcs). I.

23.40-23.50 Gdańsk, 1322 m (227 kcs), 278 m (1079 kcs), 230 m (1304 kcs). P. Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (Ĉiun alternan vendredon.)

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-12.40 Gdańsk, 49 m, 48 m, 41 m, 31 m, 25 m kaj 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la vendreda programo.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 16.00 h ĝis 16.30 h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislava (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Gdańsk (M. F.), Muritiba, Sabadell, Sorocaba;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Gdańsk (escepte de 66.29 Mcs), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Valencia (en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacio aŭdebla en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (25.60 m, 25.27 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m, 13.90 m). Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

DISAŬDIGOJ SUR LA MALLONGAJ ONDOJ

KONSILOJ
DE POLA
RADIO

En multaj leteroj de niaj aŭskultantoj ni trovas demandojn, kiamaniere atingi pli bonan akceptadon de niaj disendoj, speciale sur la mallongaj ondoj. Tiaspecajn demandojn plejparte ne starigas specialistoj, por kiuj tiu ĉi afero estas komprenebla. Tial ni donos al vi kelkajn konsilojn, alpaŝante al la komenco mem, tio estas al la fenomeno de la disirado de la mallongaj ondoj.

Jam en la intermilita periodo oni malkovris, ke tiuj ĉi ondoj povas disiradi je tre grandaj distancoj, pluroble superantaj la atingecojn de la mezaj kaj longaj ondoj. Ĉi tiujn ecojn havas la radiaj ondoj en la sferoj de la frekvencoj de ĉirkaŭ 27 ĝis ĉirkaŭ 5 megahercoj*; ĉi tiuj ondoj — nomitaj ĝuste "mallongaj ondoj" — havas la longecon de 11 ĝis 60 metroj. Ili havas la kapablon de plurfoja rebatiĝado. Ili rebatiĝas de la tero kaj de la jonosfero ĉirkaŭanta la terglobo, kaj tiamaniere ili disiras je la distancoj de multaj miloj da kilometroj. Se ni imagos la radiajn ondojn kiel lumradiojn, kaj la jonosferon kiel globon, en kiu koncentre estas lokita alia, malgranda globo — la terglobo, tiam ni facile komprenos la procezon de la rebatiĝado de la ondoj. Se ni lokus sur la interna surfaco de la malgranda globo reflektilon, kiu direktas lumstrion de sur la surfaco de la tero eksteren, tiam — se ne estus la jonosfero — la lumfasko kurus en la kosmon. Dank'al la jonosfero la lumoj kaj en la preparolata kazo la radiaj ondoj — rebatiĝas, revenas al la tero; de ĝi ili denove rebatiĝas ktp. Tiamaniere rebatiĝante plurfoje, en favoraj kondiĉoj, la mallongaj ondoj povas ĉirkaŭkuri la terglobo. La analogio de la reflektilo — ĉe tia bildeca prezento de la fenomeno — estas komprenebla la elsenda anteno, emisianta la radian signalon.

La rebatiĝado de la mallongaj ondoj de la jonosfero dependas de multaj faktoroj, kaj unuavice de la grado de la joniziĝo de la superaj tavoloj de la atmosfero. Kaj tio ĉi laŭvice estas ligita kun la geografia situo, jarsezono kaj taghorro, kaj ankaŭ kun la suna aktiveco. Depende de la koncentriĝo de la jonosfero kaj depende de la angulo, je kiu falas sur ĝin la radia ondo, oni elektas la plej bonan longecon de la ondo; por ke ĝia plej granda parto estu rebatiĝinta kaj trafu al la radioricevilo.

Laŭsezonaj ŝanĝoj

La radiofonioj konsideras la propagiĝajn kondiĉojn de la ondoj kaj tial ili laŭsezone ŝanĝas la frekvencojn; ankaŭ la Pola Radio ŝanĝas ilin dufoje en la jaro — en la printempa-somera kaj aŭtuna-vintro sezonoj.

Por povi aŭskulti la disaŭdigojn sur la mallongaj ondoj, la radioricevilo devus posedi la mallongondan sferon je la radiofoniaj bendoj de 49 m. ĝis 16 m. (de 6 ĝis 17 megahercoj). Tia radioricevilo devus ankaŭ distingiĝi per granda impreseco, tio signifas per la ebleco akcepti malfortan radian signalon kaj per granda selektiveco, tio signifas — per la kapablo

elekti la deziratan signalon el inter la aliaj signaloj atingantaj al la anteno.

Ĉiu radioricevilo devus esti ekipita per akcepta anteno, kio estas aparte grava ĉe la akceptado de signaloj de la malproksimaj kurtondaj stacioj. Fojfoje sufiĉas instalii en la antenaj kontaktilingoj pecon da drato, por ke la akceptado grave pliboniĝu. Oni ankaŭ povas kunligi la antenan kontaktilingon kun la fermaŝaro de la lito, kun metala pendigilo aŭ radiatoro, ekhavante tiamaniere primitivan anstataŭan antenon, kiu tamen estos nur paliativa kaj provizora solvo. Ne unufoje konsiderindan pliboniĝon de la akcepto kaŭzas ŝalto de la radia aparato al la televida anteno. Pli efikaj ol la anstataŭaj estas la ĉambraj antenoj, faritaj el kupraj aŭ aluminiuj spiraloj, dispendigitaj en la interno de la ĉambro. En la interno de la loĝejo oni povas apliki ankaŭ la plej simplajn direktajn—framajn antenojn ne okupantajn multan lokon, faritajn el drato survolvita sur lignan aŭ kartonan framon. Al tiuj ĉi antenoj ni donas la konforman direkton tiamaniere, ke ni turnas ilin ĉirkaŭ la vertikala akso. Tamen neniun anstataŭan anteno povas plene anstataŭi la ĝuste konstruitan eksteran antenon.

Pri direktaj antenoj

Por la akceptado de la mallongaj ondoj oni aplikas antenojn sendirektajn (ĉirkaŭajn) kaj direktajn. Ĉi-lastaj ebligas bonan akcepton de la disaŭdigoj el stacio emisianta el difinita direkto, eliminante samtempe la elsendaĵojn disaŭdigatajn de aliaj stacioj. La direktaj antenoj estas pli efikaj kaj povas elimini la perturbojn. Ja, aliflanke, ili estas bedaŭrinde pli malfacile fareblaj kaj bezonas multan lokon.

La plej populara anteno estas tiu de la tipo "L" aŭ "T". Ĝi konsistas el horizontala brako kaj vertikala alkondukaĵo. La alteco de la pendo estas kondiĉita de la lokaj ebloj. Tian antenon oni faras plej bone el plektita kupra ŝnuro aŭ — en la plej malbona kazo — el aluminiu drato.

En la kamparaj kondiĉoj tian antenon oni pendigas sur la alteco de ĉirkaŭ 8 ĝis 15 metroj. La longeco de la horizontala brako devus esti, se eble, plej granda; ĝi tamen ne devus superi 30 metrojn, ĉar tiam ĝia efikeco kreskas negrave, kaj aliflanke ĝia impreseco je la industriaj perturboj pligrandiĝas.

Konstruante tian antenon ni devas memori pri tio, ke ĝi mem kaj la alkondukaĵo estu izolitaj disde la muroj de la domo, disde arboj ktp., por ne allasi malgrandiĝon de la emisio forto. Tial grava estas ankaŭ enkonduko de la anteno tra la muro aŭ fenestro al la loĝejo.

Pri la antenoj oni povas paroli multe. Tial ni pretas sendi al ĉiuj interesigantoj ilustritan instrukcion, laŭ kiu ili povos elekti ion por si. Skribu al ni laŭ la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio 1, Poŝtkesto 46, Pollando.

* megaherco: 1 000 000 da hercoj; herco: unuo de frekvenco, nombro de cikloj en sekundo.

PRI LA ABONKOTIZO DE LA DOKUMENTOJ DE CED

Ekde la publikigo de ĉi tiu informo, la jara abonkotizo de la dokumentoj de CED estas: 5,— guldenoj (por Nederlando: 5,20 gld.) tiel por la anglalingva kiel por la Esperanta eldono. Ĝis nun la abonkotizoj de la du eldonoj estis malsamaj. La egaligo simpligos la administradon.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-03-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Britujo: J. Adrian Oates, FD Chester; Thomas Pendlebury, D kaj FD Holt; Myrtle Green, D Ipswich; John Gifford Fowler, D London; H.E. Platt, FD London; Kable Singh, FD Southampton. **Finnlando:** Hannes Vihermä, FD Lahti. **Francujo:** Roger Bernard, D Asnières; Sylvie Bonnet, FD Les Andelys; Edmond Plutniak, D Liévin. **GDR:** Klaus-Dieter Dungert, FD Magdeburg. **Hungarujo:** Ottó Haszpra, FD Budapest; Helena Kárász, FD Budapest; Lajos Lesznai, FD Budapest; Tibor Ujlaky-Nagy, FD Budapest; Zsolt Gyarmathy, D kaj FD Gyula; Anna Kecskés, FD Győr; László Selényi, D kaj FD Komló; Tibor Májer, FD Lókösháza. **Jugoslavio:** Miodrag Stojanović, FD Beograd; Jovan Nešić, D kaj FD Niš; Momčilo Krstić, VD Niš. **Madagaskaro:** Claude Gérard Ramanantsoa, JD Tananarive. **Nederlando:** Jnte Pals Kingma, D kaj FD Bergum; Frans Goedhart, D kaj FD De Bilt; Hein Wernik, FD Nijmegen. **Rumanujo:** Jenő Zágoni, VD kaj FD Sfintu Gheorghe. **Soveta Unio:** Roman Grinšpan, FD Taškent. **Usono:** Daniel Raasch, JD Ames, Iowa; Julie Regal, D kaj FD Downers Grove; Irene Hajdik, D kaj FD Phoenix; John L. Lewine, D kaj FD West Stockbridge. **Venezuelo:** J.E. Bachrich, FD Caracas.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj)

Britujo: VD Ipswich. **Finnlando:** D kaj FD Heinola. **Francujo:** Bois-Colombes. **FR Germanujo:** D Göttingen, D Köln. **Hungarujo:** D kaj FD (edukado), Szeged. **Italujo:** D kaj FD (instruado) Biella; FD (dancmuziko kaj SOS-aŭtoservo) Massa; Messina. **Jugoslavio:** Niš. **Madagaskaro:** JD Tananarive. **Rumanujo:** Covasna. **Soveta Unio:** D kaj FD (filatelo, turismo) Torva. **Svedujo:** JD Lund; Surte. **UAR:** Alexandria. **Usono:** D Santa Barbara; Stockton.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Krajnov, S.N., Moskva, Soveta Unio.
Casey, S-ino A., La Jolla, Kalifornio, Usono.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

1 P.O.P. Andersen, 2 S. Andresen, 3 S-ino E. Geertsen, 4 J.P. Jensen, 5 A. Kolle, 6 Alf Bechmann Sørensen, Danlando. 7 Albin Backholm, Finnlando. 8 H. Dabezies, Francujo. 9 Felix Epstein, FRG. 10 W. Akkerman, 11 J.P. van Dijk, 12 J.W. Perdeck, 13 E.L.M. Wensing, Nederlando. 14 S-ino Maria Elisa Caetano, Portugalujo. 15 J.L. Dahnke, 16 D.M. Keedy, 17 D-ro William Solzbacher, 18 R.A. Swenson, 19 Ken Thomson, Usono.

DONACOJ 1972 (Gld.)

Ĝenerala kaso: Nederlando: J.C.Hinrichs, 15,—; J.L. Muller, 200,—. Anonimaj: 3,95. Sumo ĝisnuna: 1 466,93.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

Magnetofona Servo

La ĉi-sube listigitaj sonbendaj programoj estas nun mendeblaj ĉe la Magnetofona Servo de UEA kaj aldoniĝas al la lasta listo aperinta en la revuo Esperanto 1971, p. 197. Kompleta listo estas ricevebla kontraŭ 1 respondkupono ĉe la Magnetofona Servo, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ont., Kanado




- 286 Du vortmuzikaj elsendoj de Pola Radio: "Renkonto kun Varsovio" kaj "Historio kaj legendo de la krakova trumpetvoko". 40 min.
- 56a **Universala Kongreso en Londono.**
- 288 Forumo pri lingva komunikado en la nuntempa mondo. (2a Ĝenerala Kunveno). Parolis i.a. E. L.M. Wensing, prof. Lapenna, M. Macmillan (de British Council), J. Thierry kun sekva interpreto en Esperanto kaj la angla. 180 min.
- 289 Debato pri la temo: "Neŭtraleco de UEA — ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata?" 110 min.
- 290 Brita vespero. Varia enhavo: i.a. 6 originale en Esperanto verkitaj kantoj prezentitaj de profesia kantistino, Shakespeare-aĵoj deklamitaj de Nikolaj Rytjkov, folkloraj kantoj el Anglujo kaj Irlando, kimraj kantoj prezentitaj de Kimra Virvoĉa Ĥoro, poemo de Robert Burns deklamita de William Auld. 130 min.
- 291 Oratora Konkurso. 35 min.
- 292 Solena fermo. 75 min.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

Pri fotografio, kino
korespondas
Jesus Perez Caballero,
C/ Tomas Miller 54,
Las Palmas,
Kanarioj,
Hispanujo. ➡



Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Facile atingebla de Eŭropo estas la apudmara, sudangluja feriejo Hastings, Sussex, kie en bona, komforta gastdomo "Croft House", The Croft, esperantistoj ĉiujare libertempas.

La princo de nia poezio. Frandu lian belon kaj esprimponon per La Kremo de Kalocsay, 69 poemoj el 12 libroj. £0,40 aŭ egalvaloro, ĉe Libroservo de UEA, aŭ rekte de D. Soen, 40 Long Acre Road, Bristol BS14 0HW, Anglujo.

Gekursanoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Ni certe respondos per internaciaj poŝtkartoj. Krui-zena, Kastanjeŝtr. 32, Schagen, Nederlando.

Dermod Quirke (Delegito: Wandsworth, Britujo) sciigas novan adreson: 31 Ryde Vale Road, London, SW12 9JQ. (Novaj korespondantoj *ne* dezirataj.)

Esperanto-Klubo de Kuopio, PL 119, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando, bonvenigas kontribuadojn por letervespero; bv. aldoni numeralojn 1-10 en via nacia lingvo. Inter ĉiuj respondintoj estas lotumitaj 10 tipe finnaj belaj premioj. Limdato 28.2.1973.

La Eta Princo de Saint-Exupéry estas ĉarma 102-paĝa ilustrita libro "por infanoj", verdire kun *altnivela filozofio!* Mendu ĝin ĉe la tradukinto: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source. Prezo: 28 fr. fr., afrankite.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

La dolĉa Francando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr. fr. afr. aŭ: 38 fr. fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Korespondant(in)ojn serĉas por siaj ĉiuaĝaj divers-regionaj lernant(in)oj: s-ro Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Ne respondos sed transdonos la petojn. Indiku aĝon, profesion ktp.

Librojn kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Aĉetas Esperanto-poŝtstampojn sur kovertoj, poŝtkartoj ĉefe antaŭ 1965. Ofertu! Rapida dolarpago. Richard Wood, Foreign Languages, LSU, Baton Rouge, LA 70803, Usono.

Interesuloj kun ricevebleco de senpagaj kristanaj presaĵoj estas daŭre bonvenaj kun siaj petoj al Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.


Tutmondaj infanoj: La Urbestaro kaj Centro de Esperanto Santa Coloma de Gramanet invitas vin partopreni la Duan Internacian Ekspozicion-Konkurson de pentraĵoj. La temo estas libera kaj laŭ akvarela sistemo. Aĝo de 6 ĝis 14 jaroj. Minimuma grandeco de la verkoj, 25 x 35 centimetroj. Limdato la 10a de aprilo 1973. Sendoj al Ayuntamiento de Santa Coloma de Gramanet — Ponencia de Cultura — Santa Coloma de Gramanet (Barcelona) — Hispanujo.

Sardiniaj gejunuloj (geskoltoj) deziras korespondi tutmonde. Certa respondo. Bonvolu skribi klare. Assoraider-Esperanto, via San Giovanni 311, I-09100 Cagliari, Italujo.

Individue aŭ kolektive deziras korespondi tutmonde infanoj 12- ĝis 18-jaraj. Adreso: I.S. Varjuhin, Komunističeskij N. 35 kv. 11, Rostov Don 71, Soveta Unio.

Mi deziras adopti infano(j)n el ajna lando. Kiu indikos al mi efikan metodon? Cnudde, rue Le Poulet 22, F-38240 Meylan.

Komencanto, 22-jara studento de ekonomiko, deziras korespondi ĝenerale. Kolektas nenion. Omer Ma'an, College of Economics, University of Basrah, Irako.





Al ĉiuj samideanoj en la tutmondo mi deziras pacan, feliĉan, prosperan Novjaron.
Samtempe mi deziras sciigi al la tuta Kunhomaro la celon de nia MOVADO.

Nia Membrokarto entenas jenan tekston:

1. Iĝu membro de la N. Droz-Movado por la MONDPACO.
2. Por savi la Homaron el la militoj KRISTO lasis sin KRUCUMI!
3. Ĉiu ŝtata ARMEO povas facile esti anstataŭigita per forta ŝtata Polico.
4. Tio sufiĉus por malebligi ĉiujn militojn.
5. Ankaŭ la nacioj devas vivi fratece unu kun la alia, ne nur la unuopuloj!
6. Ĉiu homo dank'al sia fervoro kaj homaraneco devas iĝi amata de la tuta kunhomaro!
7. En tiu direkto ĉiuj Ŝtatoj devas eduki siajn infanojn, ĉar ĉiu el ili estas INFANO DE DIO!
8. Per akiro de tiu karto, per unu sola kotizo egalvalora sv. fr. 3.— vi iĝas membro de nia movado, kaj helpas nin, pli rapide starigi la Mondpacon.

Kopirajto ĉe N. Droz, Mondpaca Movado, Poŝtkesto 212, 8047 Zuriko/ Svislando.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

K i a l devis tiu movado estiĝi?

En la tuta historio de la Homaro nur KRISTO lasis sin KRUCUMI por savi la Homaron el la militoj.

Ĉiu homo kaj Pacmovado devas scii tion.

Sen KRISTA AMO, paco neniam eblos, kaj nur malfido regnos.

Neniu alia DIO estas ĵaluza pri tiu scio!

Vivi kredante en la KREINTO estas vivi pace kaj feliĉe kun la tuta kunhomaro.

Ĉiu, kiu en KRISTO kredas, scias, ke LI mortis por revivi en la koro de ĉiu novnaskito.

Tiu kredo feliĉigas, fortigas, kaj tute malebligas mortigi iun ajn fraton.

Ĉiu Ŝtato malpermesas mortigon, do neniu Ŝtato estas rajta militi.

Danke al la hodiaŭa teknika progreso, ĉiu armeo iĝas absolute superflua, nur abomeninda relikvo de Hitler kaj Mussolini, nur minaco al najbaro, simile al la armiloj de la rabistoj kaj murdistoj.

Hodiaŭ la tuthomaro volas vivi pace sur la Tero, kiel la ASTRONAŬTOJ sur la Luno, nur helpante unu la alian.

Por tio ni postulas, ke en la jaro 2000 (en 28 jaroj) neniu armeo plu ekzistu sur la Tero.

Kiel fulmo tiu postulo devas rondiri la Teron.

Registaroj ĉie devas esti la unua servisto de sia popolo, kaj en tia fiksita tempo starigi la MONDPACON.

Ĉiu, kiu kredas, ke militoj ĉiam revenos, helpas nur la militintrigemulojn!

Ĉiu mondcivitano kore kaj laŭte postulu ĉie ĉi tiun vojon! entenatan en libreto "N. Droz/ KRISTO kaj MONDPACO", 74 paĝoj, broŝurita, germane verkita, prezo en vendejoj sv.fr. 5.—

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22. — 29. de julio) en La internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
Dk-8230 Åbyhøj, Danlando.

Esperantoklubo "Unueco", Krommenie/Assendelft, Nederlando, organizos denove de 5 ĝis 12 Aŭgusto 1973, la 19an Internacian Esperantoferiezemaĵon. Ĝi nepre okazos! Vi gastlogos senpage, ĉe Esperantofamilioj. Vi pagas nur por la ĉiutagaj ekskursoj. 150.— ned. guldanoj aŭ 30.— dolaroj. Ni prezentos belan programon. Limdato de aliĝo ĝis la 15 Junio 1973. Informoj, prospektoj senpage haveblaj ĉe: Esperantoklubo "Unueco", Krommenie/Assendelft, Sino A. v.d. Meulen, Popelstraat 13, Krommenie, Nederlando.

KOMPOSTO-LABOROJ?

La Centra Oficejo de UEA akceptas mendojn por kompostado IBM por ofseta preso. Petu oferton, informante pri amplekso, litertipo kaj litergrandeco, kompost-maniero ktp.

Ankoraŭ serĉataj

por la kreskantaj laboroj de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam:

kelkaj kapablaj oficistoj aŭ oficistinoj, precipe kun interesiĝo kaj talento por taskoj redakciaj, administraj, komercaj kaj librotenaj. Personoj el la landoj de E.E.K. ne bezonas laborpermeson por Nederlando.

Minimuma malneta salajro ekde 23-jara aĝo estas nun 886,40 gld. monate (por fraŭl(in)o tio signifas nete ĉ. 625,— gld. monate), plus jara ekstraĵo 8%.

Se vi volus labori en internacia medio kaj pozitive kontribui al la progresigo de la Internacia Lingvo, skribu al la Direktoro de la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,— gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro, ricevos belan esperantan bild-kalendaron.

